REGO

☆ RUSIA ESPERANTO-GAZETO ☆

movada revuo en kunlaboro kun REU *№ 5 (66) oktobro 2011*

en la numero

rakontoj pri RET-2011
Esperanta Kinofestivalo
Detlev Blanke rakontas pri Magomet Isajev
kio estas la reala trezoro de REU?
UEA sukcesis ĉe UN-Konferenco
nova eldono de la Fundamento
"Bulteno de REU", novaĵoj, anekdotoj kaj multo alia

Moskvo, 2011

enhavo

01 Pri RET-2011

03 La feliĉiga RET

04 Pri Magomet Isajev – kelkaj personaj rimarkoj

06 Sufiksaj E-vortoj mankaj en la rusa lingvo (parto 3)

15 Esperanta Kinofestivalo

22 Kio esta la reala trezoro de REU?

25 La prezidanto de REU malsukcesis

29 UEA sukcese aktivis ĉe UN-Konferenco

31 Danko por Anatolij Ivasenko

31 Novaj REU-membroj por 2011

32 Kotizoj de REU/REJM por 2012

33 Ĝemelurba renkontiĝo

35 Inter junaj koroj (raportetoj pri IJK-67)

40 Nova eldono de la Fundamento

26, 30 Anekdotoj

k3 "Velura sezono-16"

k4 Filmoj de la Esperanta Kinofestivalo

junaj partoprenantoj de RET-2011

REGo

(Rusia Esperanto-Gazeto)

№ 5 (66) oktobro 2011

aperadas ekde 2000

redaktas **Garik Kokolija**
kunredaktas **Viktor Aroloviĉ**
kunlaboras **Maksim Griŝin**

materialoj de REGo povas esti represataj, kondiĉe ke la tekstoj restos senŝanĝaj kaj estos indikita la fonto

poŝta adreso: Pjatnickoje ŝosse 45 – 105
125310 Moskvo, Rusio
retadreso: <gazeto@mail.ru>

abontarifoj por 2012:

por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj de KSŜ – 500 rubloj sendendaj al:
Коколия Георгий Владимирович
Пятницкое шоссе 45 – 105
125310 Москва
por loĝantoj de aliaj landoj – 25 eŭroj pagendaj al la konto ***kklg-r*** *ĉe UEA*

elektronika abono *– 200 rub. (5 eŭroj)*

PRI RET-2011

De la 8-a ĝis la 18-a de aŭgusto en Betta (apud Gelenĝik) okazis Rusiaj E-Tagoj. En la aranĝo partoprenis 48 personoj el 18 urboj: Arĥangeljsk, Ĉĥinvali, Ĉusovoj, Dimitrovgrad, Gelenĝik, Jelec, Kazanj, Krasnodar, Krasnojarsk, Moskvo, Novoĉerkassk, Permj, Sankt-Peterburg, Soĉi, Taganrog, Uljanovsk, Usinsk, Volgodonsk.

La partoprenantoj povis ĝui la ripozon ĉe la maro kaj pasigi 10 tagojn en E-etoso. 30 personoj loĝis en la pensiono "Kristall", situanta tuj apud la marbordo, la aliaj luis ĉambrojn en apudaj privataj domoj, unu familio loĝis en propra tendo en kampadejo.

Vladimir Bespalov, Tatjana Iljutkina, Anatolo Ivasenko

Preskaŭ ĉiuvespere estis koncertoj. Kantis Mikaelo Povorin (Moskvo), Marina Kocarj (Krasnodar), Evelina Sokolova (Krasnojarsk), kaj certe oni ofte kantis komune. Interesan artan programon preparis la dimitrovgradanoj sub gvido de Tatjana Iljutkina.

Ĉiuj programeroj okazis aŭ en somera amfiteatro, aŭ en aparta pavilono, al kiu ni donis la nomon "Verda salono". Anatolo Ivasenko kaj Vladimir Bespalov gvidis perfektigajn lecionojn por la komencantoj; Marina Kocarj detale rakontis pri sia vojaĝo tra Skandinavio al UK en Danio kaj pri la Kongreso mem, montris fotojn; Garik Kokolija gvidis konversacian rondon;

Marina Kocarj rakontas pri sia vojaĝo al UK

komencantoj, kaj ne nur ili, kun intereso ludis Esperanto-domenon, kiu estas utila lerniga ludo (krasnodaraj esperantistoj ricevis ĝin kiel heredaĵon de mortinta pasintjare esperantisto E.Ĥomiĉ, kiu siavice ricevis ĝin donace de hungaraj E-amikoj). Ĉiu komencanto fine de la perfektiga kurso ricevis donace E-libron kaj ekzempleron de la revuo "Esperanto".

Okazis ankaŭ vespero de ludoj, gvidata de Nina Zueva (Jelec). Dezirantoj partoprenis en diversaj ekskursoj kaj promenadoj en la ĉirkaŭaĵoj. Enkadre de la libroservo mi vendis 14 librojn de Martinus (ruslingvaj, sed en ili temas ankaŭ pri E-o), 700 rublojn el ties vendokosto mi sendis al REU-kaso kiel mecenatan helpon.

Mi ŝatus rimarki, ke al tiu ĉi RET aliĝis 68 personoj, sed pro diversaj kaŭzoj sukcesis veni nur 48. Pri sukcesoj kaj mankoj de nia pasinta aranĝo prefere rakontu mem la partoprenintoj. Mi faris tion, kion mi povis, REU-Estraro fakte neniel helpis al mi. Eĉ Svetlana Smetanina, kiu planis veni, kiun multaj atendis kaj volis vidi, lastmomente ŝanĝis siajn planojn pro iuj gravaj aferoj.

konversacia rondo

Plej verŝajne, sekvajare mi ne organizos RET en Gelenĝik, sed eble nur vican GelERT.

Anatolij Ivasenko,
membro de la Organiza Komitato de RET-2011,
prezidanto de Krasnodara E-klubo

LA FELIĈIGA RET

Ĉi-somere ni familie decidis vojaĝi al RET. Kaj feliĉe por ni (siberianoj) ĝi okazis ne en malvarmaj kaj aŭguste malsekaj arbaroj, sed sur bordo de Nigra maro!

Per tiuj vortoj mi povus fini rakonton pri miaj impresoj de la renkontiĝo, ĉar estas evidente ke Esperanto + Maro = Feliĉa Siberiano (des pli se gesiberianoj estas kun infano). Sed certe necesas iom priskribi detalojn.

La loko – ĉarmega. Tre bona ripozejo en arbaro, kie estas ĉiam freŝe pro multaj arboj kaj kreskaĵoj. Pitoreska arbara malsupreniĝanta ŝtupar-vojo al marbordo. Surstrata amfiteatra koncertejo.

La RET-anoj. Ne tre multaj, ne tre spertaj (bedaurinde kelkaj spertuloj hazarde ne sukcesis veni pro diversaj kialoj), ne tre junaj laŭ pasportoj, sed certe junaj anime (ĉu eblas alie en esperantista medio?). La programo. Maten-tage – plejparte porkomencanta, kaj vespere diverskoncerta kaj distra.

Do. Nenio malhelpis esti feliĉa dum la renkontiĝo. Dumtaga naĝado en la maro ne forlogis nin de la programo. Kaj la vespera programo estis ĝuste tiu Esperanto-ĉerizo sur la torto de nia feriado.

Kaj ankoraŭ unu ĉarmeco de malgrandaj renkontiĝoj. Dum Esperanto-vivo oni renkontas multe da homoj el diversaj urbojlandoj. Kaj ĝuste en malgrandaj renkontiĝoj oni finfine ekhavas ŝancon konatiĝi kaj ekamikiĝi. Malgranda renkontiĝo estas kiel lenso por ĉiu partoprenanto.

nokta ludorondo

Koran dankon al la organizantoj pro la neforgsebla renkontiĝo!

Evelina Sokolova
(Krasnojarsk)

PRI MAGOMET ISAJEV – KELKAJ PERSONAJ RIMARKOJ

Kiel ni bedaŭrinde eksciis, la 20-an de junio 2011 en Moskvo forpasis Magomet Izmajloviĉ Isajev (1928-2011), konata socilingvisto, lingvopolitikisto kaj esperantisto. Mi volonte skribas tekston pri la forpasinto, des pli, ĉar en la reto unu persono bedaŭrinde tre senkulture kaj primitive atakas la scienciston. Postmorte tio ja facilas...

Mi konatiĝis kun Isajev fine de la 1960-aj jaroj en Moskvo, kiam li ankoraŭ estis asistanto de Evgenij Bokarjov en la Lingvistika Instituto de la Akademio de Sciencoj de USSR. Post la forpaso de Bokarjov Isajev fariĝis kvazaŭ lia posteulo, almenaŭ se temas pri influhavaj kontaktoj kun la sovetiaj lingvistikaj rondoj kaj lia posta rolo en la sovetia Esperanto-movado.

Pro mia multjara agado kiel respondeca sekretario de la Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR (internacia mallongigo: GDREA) mi klopodis en GDR kaj ekster ĝi antaŭenpuŝi du agadodirektojn. Unue, tio estis la movadstrategie grava kunlaboro de la Esperanto-organizaĵoj de socialismaj landoj. Al tio i.a. apartenis la ĉiujaraj konsultiĝoj, sed ankaŭ multaj kontaktoj inter la membroj de la organizaĵoj, ankaŭ amikeckontraktoj ktp. Kaj due mi klopodis pri la evoluigo de scienca bazo por la praktika esperantista agado. En ambaŭ sferoj la kontaktoj kun Isajev estis ege gravaj kaj tre fruktodonaj. Mi povas diri, ke certagrade evoluis eĉ iuj amikaj rilatoj inter Magometo kaj mi. Mi ne certas, ĉu li tion simile vidis, almenaŭ mi tiel sentis.

Iom detale sekvante la malfacilan evoluon de la sovetia movado, mi ja konsciis pri la malsamaj opinioj, kiujn la “praktikaj” sovetiaj esperantistoj havis pri Magomet Isajev. Li unue estis prezidanto de la Komisiono pri Internaciaj Ligoj de Sovetiaj Esperantistoj ĉe Unio de Sovetiaj Societoj de Amikeco kaj Kulturaj Ligoj kun Eksterlando (1971-1979) kaj poste de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (1979-1989). En tiuj funkcioj li ne povis memstare kaj laŭvole agadi. Ĉe lia flanko ĉiam troviĝis iu “respondeca sekretario”, do – bedaŭrinde – miaj kolegoj, kiuj ofte ŝanĝiĝis kaj pri kiuj mi ne tre feliĉis. Magometo, miaj kolegoj el la soclandoj kaj mi ofte klopodis priparoli gravajn temojn en malĉeesto de tiaj “akompanantoj”. Tio bone sukcesis. Do, mi sciis pri lia malfacila pozicio: rekonata sciencisto, kiu devas subiĝi al malvasthorizontaj dungitoj, kiuj fakte malŝatis sian laboron, la lingvon kaj la adeptojn de tiu lingvo. Li ne ĉiam povis agi tiel, kiel ne malmultaj sovetiaj esperantistoj tion esperis. Li eĉ ne povis memstare ellabori siajn prelegojn. Mi memoras iun belan anekdoton pri tio. Iam li preparis prelegon por la Internacia Kongresa Universitato de iu UK. Reage al la postulo de la Esperanta Komisiono en SSOD, ke li montru la tekston, li respondis, ke jam ĉion aprobis la Akademia Instituto. Oni akceptis. Kiam la Akademia Instituto volis vidi la tekston, li respondis, ke jam ĉion aprobis la Esperanto-Komisiono en SSOD. Ankaŭ ili akceptis... Nu, li

ankaŭ estis ruza.

Mi ne nur ofte renkontis Magomet Isajev dum Universalaj Kongresoj kaj dum la ĉiujaraj Konsultiĝoj, kiam ni multe priparolis komunajn problemojn de nia ne ĉiam facila agado. Pri la problemoj de la Esperanto-movado en la soclandoj mi verkis la broŝuron "Esperanto kaj Socialismo", kies dua korektita eldono aperis en 2007 en la eldonejo "Mondial" (New York). Cetere, ĝia rusa versio enestas en la libro de Oleg Krasnikov kaj mi (*Esperanto-dviĵenie: fragmenti istorii.* Moskvo: Impeto, 2008). Isajev ankaŭ kelkfoje vizitis GDR, estis ĉe mi hejme, ĉe mia familio. Li grave subtenis niajn sciencajn aktivaĵojn, kiuj tre utilis por demunti diversajn antaŭjuĝojn kontraŭ Esperanto, kiuj kompreneble ankaŭ en GDR ne mankis.

Okaze de la 80-a jariĝo de la forpasinto en "Informilo por Interlingvistoj" n-ro 65 (2/2008) mi verkis omaĝon por Magomet Isajev kaj i.a. prezentis certe ne kompletan elekton de liaj verkoj. Cetere, oni juĝu la homojn ne nur laŭ iliaj verkoj, sed ankaŭ konsideru la kondiĉojn, en kiuj kreiĝis kaj povis aperi tiuj verkoj. Pro tio la listo eble povas interesi rusiajn kaj alilandajn esperantistojn. Jen do:

Isaev, Magomet I.:

(1974): Esperanto – jazik budušĉego? (Esperanto – la lingvo de la estonteco?) En: Teĥnika i nauka (Moskva), № 5, p. 18-19.

(1975a): Pri bazaj metodologiaj problemoj de interlingvistiko. En: der esperantist, № 71 (3), p. 11-15.

(1975b): Diskussion mit dem Leser (Diskuto kun la legantoj pri Esperanto). En: Neue Zeit, Moskau, № 44, p. 30-31. (Rusa versio: Razgovor s ĉitatelem // Novoje vremja, 1975, № 44 – La red.)

(1976a, Red.): Problemi interlingvistiki. (Problemoj de interlingvistiko). Moskva: Nauka, 160 p.

(1976b): E.A.Bokarev i interlingvistika (E.A.Bokarev kaj interlingvistiko). En: Isaev 1976a, p. 5-11.

(1976c): Problema iskusstvennogo jazika meĵdunarodnogo obŝĉenija (Problemo de artefarita lingvo por internacia komunikado). En: Isaev 1976a, p. 26-34.

(1976d): Wie überwindet man Sprachbarrieren? (Kiel oni superas lingvajn barilojn?) En: Sowjetunion, Moskau (germana versio de "Sovetskij Sojuz" – La red.), № 9, p. 26-27.

(1977a): K probleme vspomogateljnogo iskusstvennogo jazika v epoĥu naučno-teĥniĉeskoj revoljucii (Pri la problemo de artefarita helplingvo en la epoko de la scienc-teknika revolucio). En: Beloded, I.K. / Deŝeriev, J.D. (Red.): Naučno-techniĉeskaja revoljucija i funkcionirovanie jazikov mira. Moskva: Nauka, p. 44-48.

(1977b): Pri la lingvo de l' estonto. En: Blanke, Detlev (Red.) Esperanto. Lingvo,

movado, instruado. Berlin: Kulturbund der DDR / Zentraler Arbeitskreis Esperanto, p. 1-12.
(1978a): Problema miĵnarodnoji dopomiĵnoji movy na suĉasnomu etapi (La problemo de internacia helplingvo en la nuntempa etapo, ukrainlingva). En: Movoznavstvo, Kiev, № 5, p. 3-11.
(1979): Pri la stato kaj pliefikigo de laboro de sovetiaj esperantistoj kaj plibonigo de iliaj internaciaj ligoj. En: der esperantist, № 96 (4), p. 6-8.
(1981): Jazyk Esperanto (La lingvo Esperanto). Moskva: Nauka, 85 p.
(1987a): Meĵdunarodnij vspomogateljnij jazik Esperanto: voprosi teorii i praktiki (k stoletiju sozdanija i razvitija) (La internacia helplingvo Esperanto: problemoj de teorio kaj praktiko. Okaze de la centjariĝo de ĝia kreiĝo kaj evoluo). En: Voprosi jazikoznanija, Moskva, № 4, p. 83-94.
(1987b): Esperanto. Tallinn: Eesti Raamat, 70 p.
(1991a, Red.): Problemi meĵdunarodnogo vspomogateljnogo jazika (Problemoj de internacia helplingvo). Moskva: Nauka, 262 p.
(1991b): Stoletie planovogo vspomogateljnogo jazika Esperanto (Ideja, realizacija, funkcionirovanie) (La jarcento de la plana helplingvo Esperanto. La ideo, realigo, funkciado). En: Isaev 1991a, p. 4-24.

Detlev Blanke (Germanio)

SUFIKSAJ E-VORTOJ MANKAJ EN LA RUSA LINGVO

parto 3 [1]

Sufikso -EM-

Kaj tiu fenomeno de areo forlasita al memregado estis io tiom sensacia ĝuste en la **ĉioenordema** Svislando, ke al iu franca raportisto trudiĝis la realo de 24a kantono.
Andres Bickel, or., Literatura Foiro, 156 (aŭg. 1995), p. 173

Maljuna Torbjorn iris antaŭe, paŝante **faleteme**.
Baldur Ragnarsson, el la islanda, Islandaj pravoĉoj, Eldona Societo Esperanto, Malmö, Svedujo, 1964, p. 34

Rakontoj prapatraj pri nia lando antaŭ multaj jarcentoj kiam **okazemis** aferoj mirindaj.
David K. Jordan, or., Esperanto, 1997, 2, p. 35

Tamen, cent jarojn poste, mi **opiniemus**, ke ankaŭ de Beaufront ne vere respektas la ĝustan mezuron. En la sekvo de lia kontribuo fakte ankaŭ li deflankiĝas de tiu mezuro, al la mala direkto, al troa pesimismo...
Francisko Degoul, or., Heroldo de Esperanto, 2006, 6, p. 4

Sufikso -ER-

Kvankam komence ne facilas sin orienti en la rakonto, la **absurderoj** kunbrikiĝas harmonie, tiel ke sur p. 57 (el 232) mi jam legis kun apenaŭa surprizo frazon...
Jorge Camacho, or., Hispanio, Esperanto, 2006, 11, p. 232

Via propra teksta praktiko montras, tamen, ke vi ne rigardas kiel hipokrita vian in-

[1] La antaŭaj partoj aperis en REGo №№ 3 (64) kaj 4 (65), 2011.

sistan amarecon, kvankam ankaŭ ĝi forgrizas la dolĉajn **realerojn**.
Probal Daŝgupto, or., Literatura Foiro, 185 (jun. 2000), p. 158

Certe la horloĝo de la trajno estas malafabla. Kiam mi estis atinganta la kajon 8, ĝuste tiam la trajno adiaŭis min. Malbedaŭrinde la trajnsistemo estas ege bone organizita, kaj la horloĝoj de la kajo vere simpatiaj kaj afablaj. Kelkajn **temperojn** poste alvenis alia trajno. Mi ensaltis...
Koffi Gbeglo, or., Togolando, Heroldo de Esperanto, 2002, 9, p. 3

Sufikso -ET-

Atendetu, kara mia amiko, paciencu, tuj mi elcerbigos movon kiu vin surprizos kaj samtempe vi perdos emon tabli kun mi...
Miroslav A. Andriĉ, or., Sferoj-3. Sciencfikcio kaj fantasto, 1984, Grupo Nifo, Barcelono, Hispanio, p. 85

Ŝi ekeksplikis ĉion **eto** post **eto**, dispecigitan. Mi devis ĉion forpreni al ŝi per multaj demandoj...
Manuel de Seabra, or., Hispanio. La Kancerkliniko, 71 (jul.-sep. 1994), p. 5

En la periferio de l' **et-eta** urbo troviĝis malnova ĝardeno.
Karl Gustafsson, el la sveda, Norda Prismo, 1969, 2, p. 99

Laŭ la kutima diro de mia **instruisteto**, via psiko estas malsana.
Jorge Teles, or, Brazilo. Fonto, 274 (okt. 2003), p. 9

Ekzistas **ekzisteto** kaj ekzistego.
El kolekto de Klara Ilutoviĉ, Elektrostalj, Rusio.

... oni ekkonscias, ke oni bezonas internacian lingvon kreitan por esti internacia, ke tia lingvo ekzistas kaj oni jam duone ellernis ĝin dum **etfruktaj** klopodoj por majstri la anglan.
Eŭgene de Zilah, or., Hungario-Francio, La Gazeto, 86 (jan. 2000), p. 4

... sed katalunlingvanoj plu facilege ekparolas en la hispana aŭ la franca pro la enradikiĝinta socia postulo, laŭ kiu **etlingvanoj** ĝentile uzu la lingvon de la eglingvanoj.
Hektor Alos i Font, or., Hispanio, Kontakto, 2006, 3, p. 5

Sed se, konstateble, nacilingvaj dramistoj estas ne tre multaj kompare kun romanistoj aŭ poetoj, des pli frapas tiu fenomeno en **etpopola** Esperantio.
Solen, or., Francio, Sennacieca Revuo, 1991, 119, p. 25

Ĉiuj nomoj estas aŭ plene esperantigitaj aŭ almenaŭ skribitaj per la esperanta alfabeto krom **kelketaj**, kiuj subtenas la fluan legadon. [emocia malgravigo]
La Gazeto, 103 (dec. 2002), p. 27

... kaj antaŭ mi aperas juna, blanke vestita flegistino. "Sekvu min!" ŝi **ordonete** admonas. Ŝtuparo supren kaj...
Norda Prismo, 1956, 4-5, p. 192

La fremduloj silentis, kaj jam post **tujeto** ili enabruptis sian aŭtomobilon.
Jozo, or., La Kancerkliniko, 65 (jan.-mar. 1993), p. 25

Iam estis lando ĉe la malsupro de granda montaro kun montoj tiom altaj, ke iliaj

pintoj ne estis videblaj pro la nuboj. Nur en maloftaj belaj someraj tagoj oni povis **videti** la neĝkovritajn pintojn alte en la senfino.
Willy Nielson, Norda Prismo, 1962, 4, p. 100

Sufikso -ID-

Olivier Willocx, de la Brusela Komerca kaj Industria Ĉambro, asertas ke tro multaj **bruselidoj** estas alergiaj al la lernado de la nederlanda. ... La franca estis iam la lingvo de la belga kaj brusela elito, sed la postmilita periodo vidis la flandran ekspansion.
Heroldo de Esperanto, 2007, 12, p. 1

Fakte "okcidento en oriento" povus esti vortumita kiel "okcidenta civilizacio en oriento". "Okcidento" en nia kunteksto referencas al Eŭropo kaj "**eŭropidaj**" mondpartoj kiel Usono...
Usui Hiroyuki, or., Japanio, Esperanto, 2007, 3, p. 54

Kaj por fini, kvankam neniu multeldona franca firmao disvendos mian artikolon (mi ne taksas ĝin vendinda sed simpla memkontentiga **konsterniĝido**), indus lanĉi kelkajn konsilojn...
Arturo Romero, or., Hispanio, La Kancerkliniko, 84 (okt.-dec. 1997), p. 8

La embargo paralizis la viglajn komercadon kaj fremdultrafikon al jugoslaviaj **idlandoj**. [Normalus ankaŭ **landidoj**.]
Karlo Juhasz, or., Hungario, Monato, 1996, 4, p. 9

Dua kadrokandidato estas via stilo. Al mi ŝajnas kongrua kun viaj komunikaj intencoj la sufero-reliefiga, rifuzo-ĉefiga restado ĉe alta diskuta temperaturo. Sed la konversaciado pasia, pro la strukturo de la **pasiidaj** ĝenroj, ekzilas multajn diskuterojn, kies gravon oni do retrovos nur en momentoj de trankvila solo.
Probal Daŝgupto, or., Literatura Foiro, 185 (jun. 2000), p. 156-157

Sur la tuta vegetaĵo, roso gutas... Sur ĉiu **trunkido** troviĝas molaj smeraldaj folietoj ĝermintaj dum la nokto.
Paulo Sergio Viana, el la portugala, Fonto, 256 (apr. 2002), p. 23

... "Ĉi tie ĉio apartenas al vi" – mi diras kun dolĉa doloro engorĝe, Anna komprenas la sencon de la frazo, ridetas. Venteto ekestas, ekŝvebas la branĉoj, denove – kiel printempe Danubborde – iu **ventido** eknestas en la hararo de Anna. [En la daŭrigo la protagonisto plantis en Anna idon.]
István Nemere, Febro, HEA, Budapest, 1984, p. 77

Sufikso -IG-

L' aŭdaca paro **vivuigos** "ĝuon!" agentoj fanatikaj de Amoro.
Timothy B. Carr, or., Fonto, 158 (feb. 1994), p. 5

... sed se ankoraŭ ili troviĝas en Romo, vi povas **risortigi** la kaptilon, kies logaĵo mi estas.
Corrado Tavanti, or., Italio, Varmas en Romo, Koop. de "Literatura Foiro", Svislando, 1986, p. 94

Ĉiu sciis kion ŝi celis, tamen neniu **vortigis** ĝin.

Eckhard Bick, el la germana, Sferoj-2. Sciencfikcio kaj fantasto, Grupo Nifo, Hispanio, 1983, p. 44

Vi eĉ ne bezonis **vortigi** vian deziron.
R.Hromada, el la ĉeĥa, Riporto skribita en la pendumila maŝo, Prago, ĈSSR, 1979, p. 66

Enmiksiĝinte en ilian vivon per la ardklingo de sia tranĉilo ŝi semis morton, sed ankaŭ liberiĝon, ŝi **neproigis** hazardon, **reguloigis** ludon, modlis futuron sekcante prezencon, kaj post cikatriĝo, ĉelsortoj sekvis novajn vojojn.
Jovan Zarkoviĉ, el la serba, "O" kaj aliaj rakontoj, D.Mikulićić, Zagreb, 1988, p. 55

Ni alvenas al la parlamento. Gvidantino komencas **vizitigi**. Ŝi faras sian ĉiutagan laboron...
Giuseppe Castelli, or., Italio, Esperanto, 2001, 11, p. 190

En kiajn nesondeblajn, nekonatajn abismojn estis kondukita la infano, destinita por **ĉiamigi** lian nobelan praularon.
L.C.Porto Karreiro Neto, el la portugala, Emanuelo, Antaŭ du mil jaroj, Federaçåo Espirita Brasiliera, Brasil, 1993

Priester estas enmigrinto el tiu por meza Dalmatio sufiĉe nebuloza regiono kiu **entutigas** kaj Tirolon kaj Karintion, kaj Stirion, kaj la tutan Danubvalon...
Roger Imbert, el la kroata, Moderna Kroatia Prozo, Zagreb, 1979, p. 230

Sufikso -IĜ-

La lingvosimplema Corsetti, inspiranta nin discipline paroli la tabelan, emfazas la skemisman vivantigon de la afiksoj kiel la bazan novaĵon en la zamenhofa ilaro. Ĝuste tie **donaciĝas** al ni internocia lingvo, kies konkretan guston neniu suspektas antaŭ ol sperti ĝin.
Probal Dasgupta, or., Hindio, Esperanto, 2007, 12, p. 244

Li **gastiĝis** en Akravorta Hotelo.
Jean-Luc Tortel, el la angla, La Ondo de Esperanto, 6, 2006, p. 13

Rapide, haste krei poemojn, seĝojn, tradukojn, maŝinojn **pagiĝas** ĉiam je la kosto de la kvalito.
Georgo Kamaĉo, or., Hispanio, Monato, 1994, 12, p. 22

Sed infano-libroj (almenaŭ angla-lingvaj), kiuj hodiaŭ **aĉetiĝas**, konkurse **premiiĝas** (kaj supozeble **legiĝas**) tiom similas al...
Paul Gubbins, or., Literatura Foiro, 171 (feb. 1998), p. 41

Kaj neatendite, kiam venis ŝia deka naskiĝtago, la testudo ŝin vizitis. Estas mirige! ... Kaj ĉe la trideka jaro ŝi renkontis ĝin en sia hejmo. ... ĝis la sesdeka jariĝo ĝi ree alvenis kaj **skulptiĝis** sesafoje. [ruse: kaj "pentriĝis"]
Mao Zifu, or., Ĉinio, Literatura Foiro, 156 (aŭg. 1995), p. 212

Rolando Horváth diris pri sia patro naĝinta malproksimen kaj apenaŭ videbla: La patro jam **butoniĝis**. [temas pri denaskulo]
Rolando Horváth, or., Hungario, Literatura Foiro, 124 (apr. 1990), p. 44

Mi tamen devas aldoni, ke temas nek pri aventura romano, nek pri amo, nek pri politiko... Sed ĉio tia troviĝas en la **tratempiĝo** de la vivo en la urbeto: amo kaj malamoj, helpoj kaj persekutoj, ŝercoj kaj seriozaĵoj...
Geraldo Mattos, or., Brazilio, Fonto, 254 (feb. 2002), p. 29

Du petis ŝian manon kaj havis honestajn intencojn; unu estis netaŭga ventkapulo, sed la alia ne estis tro malbona – kvankam li posedis nenion, **kompreniĝas**. Ŝi diris "ne"...
Finn Elwarth, el la dana, Fonto, 262 (10/2002), p. 33

Liaj okuloj **palpiĝas** amike al la grizhara bronzvizaĝo de Ĉalan.
el la hungara, Norda Prismo, 1967, 2, p. 100

Mi deziras veni en kontakton kun novaj homoj, kun homoj kiuj havas nenion komunan kun mi, kun tiuj kiujn mi konas kaj kun kiuj mi ĉiutage **vidiĝas**.
Roger Imbert, el la kroata, Moderna Kroata Prozo, Zagreb, 1979, p. 468

La vickolonelo surmetis gantojn kaj **svingiĝis** sur la fenestron, kiu estis iomete alte.
J.Vondroušek, el la ĉeĥa, Karel Čapek, Rakontoj el unua poŝo kaj rakontoj el la dua poŝo, ĈEA, Prago, 1981, p. 52

Ĝi [eldonado de "HdE"] donis al mi tiom da ĝojo, tiom da plezuro intelekta kaj movada, tiom da **instruiĝo**, scioj, konatiĝo kun la homoj diversaĝaj...
Ada Fighiera-Sikorska, or., Italio, El Popola Ĉinio, 1997, 3, p. 8-9

... ĉu eble en tiu rondo ne ankoraŭ estas vaka loketo por li, ke ankaŭ li estas soleca kaj ne bone scias **kieniĝi**.
Rikardo Ŝulco, el la germana, Heinrich Böll, La perdita honoro de iu Katarino Blum', Edition Leipcig, 1978, p. 74

Kompreneble Klara Carloni tuj vidis la koincidon de mia vizito.
– Kion vi respondis?
– Nu, mi iel **svingiĝis**...
Corrado Tavanti, or., Italio, Varmas en Romo, Koop. de Literatura Foiro, Svislando, 1986

Vi volas multon junul'. Mi diras al vi , ke taŭrolud' ekzistas en Angli' ekde Anglio mem **ekzistiĝis**.
Grace Kirkwood, T.Steele, N.Nicholas, D.Broadribb, el la malnovangla, Mary Webb, Malbeno kara, Beverley, Aŭstralio, 1994

Ginsengo **rigardiĝis** kiel mirakla medikamento kaj estis...
or., Koreio, Espero el Koreio, 1994, 3, p. 10

Kvankam en Ĉinio ŝajne neniiĝis la feŭdaj familioj kun kvar generacioj sub la sama tegmento kia estis la familio Gao, la veneno de la feŭda socio tamen ankoraŭ restas kvazaŭ malpura akvo stagna ĉe la korta murangulo... Dum iu periodo, eĉ mi mem misopiniis, ke miaj romanoj jam "**fortempiĝis**", sed ĝis hodiaŭ mi ankoraŭ sentas la nerompeblan kaj milkanalan ligitecon al mia antaŭa feŭda familio. Kia teruraĵo! Kaj mi komprenis, ke miaj romanoj ne **fortempiĝis**. [ruse: кануть в века]
Wei Yide, el la ĉina, Bakin, La Familio, ĈEL, Beijing, 1999, p. 571

Kiam mi ekstaris por foriri, Faris Karameh **proksimeniĝis** al mi kaj diris...
Georgo Abraham, el la araba, Ĝ.Ĥalil Ĝibran, La rompitaj flugiloj, Kult. koop. de e-istoj, Rio de Janejro, Brazilo

Kaj ni esperas, ke ankaŭ la membroj de la Studentrondo **emiĝos** alproprigi la Internacian Lingvon...
Ildikó Dudás, or., Hungara Vivo, 1982, 5, p. 165

Poste **diriĝis**: la milito estas finita...
Roger Imbert, el la kroata, Moderna Kroata Prozo, Zagreb, 1979, p. 269

Do, kiukiale vi sidis hieraŭ sur la ŝtuparo?
Kaj aŭskultis de kie **portiĝas** bojado?
Anja Karkiainen, el la finna, Literatura Foiro, 212 (dec. 2004), p. 308

Ja Maupassant ne estas porinfana verkisto. Lia "naturalismo" filozofie **nutriĝis** el Schopenhauer, pensisto malmilda, pesimisma, krude realeca.
Jean-Luc Tortel, or., Literatura Foiro, 212 (dec. 2004), p. 313

Ja se Thoreau vere influis Gandhi-on, **poviĝas** ke ankaŭ min li influis, eĉ se nur pere.
Eŭgene de Zilah, or., Hungario-Francio, La Gazeto, 117 (mar. 2005), p. 4

Kiam mi komencis spiri, venis la milito kiu perdigis profesie al mi dek jarojn. Mi tamen **finiĝis** kiel ĉefinĝeniero de "Karbominejoj de Franclando".
J.Manceau, or., Francio, La Kancerkliniko, 63 (jul.-sep. 1992), p. 6

Ni kune trinkis bonan freŝan vinon. ... Ni eĉ bone **kamaradiĝis** kaj neniam plu mi aŭdis...
Ĵak Le Puil, or., Francio, La Kancerkliniko, 75 (jul.-sep. 1995), p. 4

Intertempe la malmultajn fenestrojn, kiujn oni malfermis por vidi la kverelon... la virinoj **alfenestriĝintaj** estis ĉiuj similaj, ĉar la komuna sento de ĉioa sensenco presis sur ilin tiun neŭtran aspekton, videblan ĉe fiŝoj aŭ ĉe ĵus-mortintoj.
António De Macedo, or., La Kancerkliniko, 87 (jul.-sep. 1998), p. 11

Rilate la lernadon de la angla, li kun pluraj aliaj atentigis pri la ĝenerale neefika komunika nivelo kiun atingas lernantoj de la angla. Se nedenaska parolanto dezirus paroli, diskuti, negoci similnivele psikologie kaj lingve kun brito, irlandano, usonano, averaĝe necesus por atingi tiun nivelon 12.000 horoj da lernado, inkluzive restadon en la koncerna kulturo kie **paroliĝas** la lingvo. Kio reprezentas entute 75 jarojn!
Duncan Charters, or., Heroldo de Esperanto, 11 (10 – 31 aŭg. 2005), p. 1

Kiam la siberia popolo de njenjecoj (nuntempe 40-milopa) estis pelata al ruslingvaj lernejoj, ĝi spertis ekperdon de ne nur sia lingvo, sed ankaŭ de siaj tradicioj kaj kutimoj ĝenerale, dum ĝiaj ŝamanoj estis murdataj kaj ĝiaj boacoj – kolĥozigitaj. Ne rajtis ekzisti pli ol unu maniero esti sovetiano, kaj la homaro survojis al **unulingviĝo** rusa, laŭ Stalin-flataj istoj pri lingvo.
István Ertl, or., Hungario, Esperanto, 2004, 10, p. 195

Sufikso -IL-

Ĝuste en la stilo – tiu ŝatata sudeŭropa **apriorilo** – oni la "amatinon vestas", por

inviti al nia saĝumo ankaŭ la hungaran prabardon...
Probal Dasgupta, or., Hindio, Riveroj, 26 (nov. 1999), p. 42

Falko venas je pafdistanco por unu el ili, la sago flugas tra la aero, kaj la traborita birdo **flugilas** kaj provas subakviĝi, sed estas tuj alte levata sur la sagpinto...
Henry Fridén, el la norvega, Norda Prismo, 1962, 2, p. 41

Mi kredas ke venis la tempo por formuli pli ĝeneralan movadan imperativon, en formo de demando: kiamaniere ni malgrimpu desur la retoriko-montoj kie ni foje **kaptilas** nin?
Probal Daŝgupto, or., Hindio, Esperanto, 1998, 1, p. 10

... en 1958 sekvis lia *Esperanta Antologio,* kiu por multaj homoj (certe por mi) estis la ĉefa **enkondukilo** al la historia fluo de poezio en la Internacia Lingvo.
Humphrey Tonkin, or., Britio-Usono, Esperanto, 2006, 11, p. 219

Kiam la tabela trunko internocie altradukas al si la babelajn branĉojn en nia unika **lingvilo**, historie rolas do specife orienta asimilo de okcidenteroj – sed en la skemisma formato, kiu unikigas nian muzikilon.
Probal Dasgupta, or., Hindio, Esperanto, 2007, 12, p. 244

Kaj poste mi vidis ke en tiu libro por diri kruro oni havas "gambo", **kurilo**, **paŝilo**, **marŝilo**... Tio entuziasmigis min kaj mi ekpraktikis Esperanton...
Claude Gacond, or., Svislando, La Gazeto, 95 (jun. 2001), p. 10

Ĉiu ŝtato bezonas hundojn kaj torturistojn bone trejnitajn... Policistoj, turmentistoj kaj ekzekutistoj estas ŝtataj funkciuloj, **ŝtatiloj**, kiujn malami estas same vane kiel malami la pinĉilojn de dentokuracisto.
Eŭgene de Zilah, or., Hungario-Francio, La Gazeto, 93 (mar. 2001), p. 5

Tradicie oni kutimas distingi 3 "**itinerilojn**" en la instruoj de Budhao: La dua itinerilo nomiĝas Mahåyãna aŭ GRANDA ITINERILO: ĝia ĉefa principo estas, ke nia vera naturo ebligas...
Catherine Roux, or., La Gazeto, 85 (dec. 1999), p. 11

Fotofulmilo – ruse "вспышка"
Esperanto, 1974, 9, p. 160

Antaŭ ol tuta horizont' ekpalis
al unu sola aspekto de senbrido
kaj l' nokto ĉiujn lokojn envualis,
po unu ŝtupo faris ni **kuŝilon**,
ĉar rompis ĉiun forton plu vojaĝi
la mont-natur' kaj l' vojomalfacilo
Enrico Dondi, el la itala, Fonto, 213 (sep. 1998), p. 3

Li certe perdas sian kapon. Almenaŭ ŝajnas al mi ke ĝi malgrandiĝas, kiel lia **virilo**.
Higinio Garcia, or., Monato, 2001, 3, p. 27

Ili havas flankojn rondan kaj platan. Kiam la kvar bastonetoj estas ĵetitaj aeren kaj falintaj surteren, ili montras aŭ rondan aŭ platan flankon. Laŭ tiu montro oni kalku-

las poentojn. Kaj laŭ poentoj mal(**poentilo**) kuras sur juttabulo. ... La teamo, kies poentiloj pli frue finas rondiri la juttabuon, gajnas la ludon.
Kim Uson, or., Koreio, Literatura Foiro, 200 (dec. 2002), p. 333

La virino ne estas nur **naskilo** aŭ stimulilo por la viro. La virino bezonas kaj rajtas ĝui la vivon, ne kiel malĉefa rolulo.
Mao Zifu, or., Ĉinio, Riveroj, 1996, 11, p. 17

Gilbert Ledon komencas sian libron per la aserto ke la homo estas "la plej malsupera ekzistaĵo"...
Nu, el ia vidpunkto li pravas – neniu alia ol la homo tiom vaste detruas la vivmedion, ekzemple – sed nenian aludon al humuro, nenian **kondiĉilon** li prezentas.
Joel Brozovsky, or., Usono, Riveroj, 1993, 1, p. 30

Mi, ŝajne, nun fariĝis aĉe pigra –
Nenion verkas, vakas la pensej'
Kaj la **sentilo** siajn sentojn plej
Subtilajn jam forgesis tute.
Vladimir Samodaj, or., Rusio, Ne nur legendoj, ne nur pri SEJM, Moskvo, Impeto, 1999, p. 173

... inter kiuj lastatempe lingvaj kaj naciaj bariloj restas efikaj **kontraŭiloj** al la progreso.
La Praktiko, 1938, 19, p. 5

Fela kondamnis, malgraŭ la pastreco de sia patro, religion kiel **kontribuilon** por la daŭra ekspluatado de ordinaruloj.
Ogúinye Prince-Henrik, or., Niĝerio, Kontakto, 1997, 5, p. 7

Mute kaj kun seka gorĝo vi atendas antaŭ la pordo, dum la flamoj tie ene atendas vin. Vi prenas la pordan **manilon**, malfermas kaj paŝas rekte en bruligan varmegon.
Sten Johansson, or., Svedio, Literatura Foiro, 211 (okt. 2004), p. 238

"Ni ne foriĝu de la temo", avertis Peneia, "ni samopinias, ke la pantalono estas la signo de la vira digneco, kaj ju pli eleganta estas la pantalono kaj... Ĝi estas la **rekonilo** de lio inter la homoj".
F.S., el la dana, Norda Prismo, 1955, 1, p. 12

Certe la aŭtoro demonstras laŭdindan imagivon, kaj la romano, estiel moderna aventura **distrilo**, bone funkcias.
Adrian Hall, or., Aŭstralio, Esperanto, 1992, 6, p. 114

Sufikso -IN-

*peniso/**penisino*** ["peniso"/"vulvo"; la denaska infano estis kun la gepatroj nudaj, kaj tiel nomis kaj indikis la respektivajn seksorganojn; la plenkreskula Esperanto estas vere radikmalŝpara]
Kontakto, 2006, 3, p. 12

... ke ŝi por li – kaj eble por aliaj – funkciis kiel loĝiga **helpino** kaj ekzakte scias, kie li restadas.
Rikardo Ŝulco, el la germana, Heinrich Böll, La perdita honoro de iu Katarino

Blum', Edition Leipcig, 1978, p. 80

... estimata **inlanda** poetino Maron Meva...
Penseo, 13, p. 1

En Barnaula E-klubo (Siberio) mi donis al la klubano Volodja Ditjatev iun komision. Sekva-kunvene mi demandis ĉe li la plenumon. Li diris, ke ne povis la plenumon. Mi demandis la kaŭzon de tio. Li ŝultrumis paŭzante. Mi instigis lian respondon kaj tuj poste la klubano Viktoro Ĉaldaev ne elteninte diris: evidente estis ne kaŭzo sed **kaŭzino**. La klubanoj ekridis. Videbla ruĝeto kovris la vizaĝon de Volodja, sed li nenion diris.
Anatolo Gonĉarov, en la tempo de la 70-aj jaroj

Umas en lia prozo ne la kabinetaj, anekdotaj E-putinoj de Beaucaire, sed la **matraculinoj** anonimaj kaj grand-animaj de nia hipokrita liberalisma mondo.
Jorge Camacho, or., Hispanio, Esperanto, 1999, 7/8, p. 133

Sufikso -IND-

Iom malpli melodie sonas Dante en la tradukoj de Ross:
... nek **indis** pli ol dam' juvel' sezona...
aŭ aliloke:
Bonŝanculoj! certis ĉiu, ke la...
Italinde belega eldono, diligente farita studo, la verko de la forpasinta Vittorio Russo nepre etrovos legantaron...
Yenovk Lazian, or., La Ondo de Esperanto, 2002, 2, p. 16

La rakonto okazis en B., forgesita kaj **forgesinda** banloko en la plej morna angulo de la Vasta Arbaro.
Horst Vogt, or., La Gazeto, 91 (dec. 2000), p. 18

Bays, instruisto loĝanta en fora regiono de suda Brazilo, en 1977 apudprofesie komencis **prezinde** kompostadi por E-eldonejoj.
Stefan Maul, or., Germanio, Esperanto, 1996, 1, p. 9

Sufikso -ING-

... ŝi **ingis** fumantan cigaredon liabuŝen kaj baletis sur la gropo de l' ĉevalo.
Miguel Fernández Martin, or., Hispanio, Literatura Foiro, 142 (apr. 1993), p. 72

... por signo de tio, ili denove **ingis** la glavojn, kritikante Quiterian pro ties ŝanĝiĝemo...
Fernando de Diego, el la hispana, La inĝenia hidalgo Don Quijote de la Mancha, Fundacion de Esperanto, Hispanio, 1977, p. 512

En la ringoforma **kapingo** de la Granda Koordinisto komencis cirkuli ankoraŭ malklara ideo...
La pensoj estis ĉiam pli kaj pli transigataj de kapo al kapo, la ideo cirkulis rondumante kelkafoje la **kapingan** ringon...
J.Zarkoviĉ, el la serba, D.Mikuliĉiĉ, "O" kaj aliaj rakontoj, Zagreb, 1988, p. 147

ESPERANTA KINOFESTIVALO

La 10-13-an de julio 2011 en la brazila urbego San-Paŭlo sukcese pasis la unua Esperanta Kinofestivalo "Kino sen limoj" (plue nomota EKF-1). Ĝi pasis enkadre de la tri kongresoj, okazintaj en la sama ejo: 8-a Tutamerika Kongreso de Esperanto (TAKE), 46-a Brazila Kongreso de Esperanto (BKE) kaj la 31-a Brazila Esperantista Junulara Kongreso (BEJK). Dum tri festivalaj tagoj estis montritaj dekoj da filmoj, estis ankaŭ aliaj laŭtemaj programeroj (prelegoj, metiejoj, ekspozicioj). Ĉiu prezentaĵo tiel aŭ alie estis ligita al Esperanto. Mi bonŝancis ĉeesti kelkajn erojn de la festivala programo, kiuj lasis tre bonan impreson. Des pli scivole mi intervjuas la direktoron de EKF-1, nian samlandanon ***Aleksander Osincev****, kiu kuraĝis lanĉi aferon novan, nekonatan kaj, mi diru, dubindan.*

Irina Gonĉarova (Moskvo)

---

1. Kial venis al vi la ideo pri Kinofestivalo, ligita kun Esperanto? Ja evidentas, ke aŭdvida kulturo en Esperantujo ne estas evoluinta.

Ĉiam, kiam mi prezentadis Esperanton en universitato aŭ dum specialaj prezentaĵoj antaŭ urba kurso, oni demandadis min pri tio, ĉu ekzistas radio, televido en Esperanto, ĉu eblas spekti filmojn en la internacia lingvo. La t.n. radio ekzistas minimume en formo de podkastoj, televido ne ekzistas, filmoj estas vere malmultaj kaj plie estas malaltkvalitaj. Laŭ mi, tio estas hontinda por esperantistoj. Do, mi post dujara kunordigado de Verda Filmejo <www.filmoj.net> venis al konkludo, ke ni povus ekokupiĝi pli serioze pri moderna aŭdvida kulturo, kiu en Esperantujo estas magra. Fondiĝis krea unuiĝo "Filmoj sen limoj", kiu agas 100-procente laŭleĝe. Do, kiel logika kaj natura daŭrigo de tiu prifilma agado naskiĝis la unua Esperanta Kinofestivalo <www.kinofestivalo.org>, kiu devus krei kondiĉojn por ke aliaj talentaj kaj kreemaj esperantistoj ekokupiĝu pri kreado de altkvalitaj aŭdvidaj materialoj.

2. Sur kiuj materialoj baziĝis EKF-1?

La 2-an de aprilo ni anoncis videan konkurson, kies konkursaĵoj eniris la konkursan programon de la kinofestivalo. Ni ricevis 21 konkursajn videojn kun daŭro 5, 15 aŭ 30 sekundoj, kiujn poste pritaksis 5-kapa internacia ĵurio. En ĉiu kategorio estis elektita 1 gajninto. Dum la kinofestivalo ni anoncis gajnintojn kaj ili

ĉiuj ricevis premion: la aparaton *iPod Touch 4gen*. Krom tio, pli grandan parton de la kinofestivalo kreis nekonkursaj filmoj. Ni sukcesis kolekti 15 filmojn el 7 landoj, kiuj estas profesie kreitaj dum kelkaj lastaj jaroj. Tio estas filmoj pri Esperanto kaj en Esperanto, dublitaj aŭ subtekstigitaj.

3. Kiel vi taksas ĝeneralan nivelon de la konkursaĵoj (videoj 5-, 15- aŭ 30-sekundaj)? Ĉu la realaĵo kongruis viajn atendojn?

La konkurso daŭris du monatojn, kaj dum tiu periodo ni ricevis 21 videojn. Verdire, mi atendis pli da videoj, ĉar la reguloj ne estas tre rigoraj. Ĉiu deziranto, havanta fotilon, poŝtelefonon, komputilon, povis partopreni, ja necesis krei videojn, kiuj daŭras nur 5, 15 aŭ 30 sekundojn. Ŝajne tion malhelpis la fakto, ke informkanaloj en Esperantujo estas tro malfortaj. Krome, tiu evento okazas la unuan fojon, do preskaŭ neniu ĝin konas. Sed ni estas la unuaj, kiuj proponis tiom valorajn premiojn por la amatoraj videoj. Sed kiam mi komencis ricevadi videojn, mi komprenis, ke la ĵurio havos malfacilan elekton. Multaj videoj estas amatoraj, sed ni pritaksas ne la teknikan flankon, sed la idean kaj la prezentan flankojn. Dum la prezento de konkursaĵoj dum la kinofestivalo ĉiu video estis akompanata de aplaŭdoj, la spektantoj, samkiel mi, ŝategis la videojn. Interalie, ĉiu deziranto povas spekti la videojn ĉe <www.kinofestivalo.org/video>.

4. Kiuj kriterioj ekzistis por elekti nekonkursajn filmojn? Ĉu ĝenerale temis pri elektado, aŭ vi akceptis ĉion, ial ligitan al Esperanto, kion sukcesis akiri?

Se vi rigardus la programon de la kinofestivalo, vi povus rimarki, ke en ĝi la plej granda parto estas freŝaj filmoj pri kaj en Esperanto, kiujn la granda plejparto de esperantistoj ne jam sukcesis spekti. “La Universala Lingvo”, “Esperanto”, “Planlingvo: la filmo”, “Atako de lunaj zombioj”, “Polaj Spuroj”, “Vojaĝo en Palestino” estas filmoj, kreitaj en 2009-2011. Do, la unua kriterio estis freŝeco. Kaj la spektantoj havis unikan ŝancon spekti ilin en unu loko tute senpage sur granda ekrano. La dua kriterio estis ĝuste unu el la celoj de kinofestivaloj: rompi ekzistantajn stereotipojn kaj imagojn de homoj pri la ĉirkaŭa mondo. Du dokumentaj filmoj (“La Universala Lingvo” kaj “Esperanto”) devis prezenti Esperanton, kiel ideon, kaj esperantistojn, kiel komunumon kaj movadon, per okuloj de neesperantistoj. Tiuj filmoj estis malferma kaj ferma filmoj. Ni kvazaŭ kreis kadron el tre polemikaj

kaj tre pridiskutindaj filmoj. Kaj evidentiĝis, ke tute aparta mallonga filmo el arta programo efikis eĉ pli ol ĉiu el tiuj filmoj. La filmeto de germana reĝisoro Martin Schreier kun kelkaj erotikaj scenoj provokis plendon de unu spektanto al organizantoj de la kongreso, ke ni prezentas ĝuste erotikaĵon kun subtekstoj en la sankta lingvo. Pri tiu fakto mi sincere fieras. Alia anoncita celo estis subteno de nacia kulturo. En tiu temo ni prezentis du filmojn: novegan dokumentan filmon "Polaj Spuroj" de Rogener Pavinski pri polaj enmigrintoj en Argentino dum la dua mondmilito kaj francan dokumentan filmon "Ja tair ja tajer, Vojaĝo en Palestino" pri la israel-palestina konflikto el la vidpunkto de palestinanoj. La impreso de la spektantoj pri la dua filmo estis tiom forta, ke ili eĉ diris, ke ilia opinio pri la konflikto ŝanĝiĝis. En la arta programo ni nepre volis prezenti filmon pri modernaj dancoj kaj trovis perfektan filmon "La kosto de vivado" de la brita reĝisoro Lloyd Newson kaj mallongajn filmojn de germana reĝisoro Martin Schreier, kiujn mi spektis dum alia kinofestivalo kaj kiuj min absolute ravis per sia specifa maniero de prezentado de reĝisora ideo. Do, vi vidas, ke en la programo estas nek fipopulara "Inkubo", nek la duonamatora "Gerda Malaperis", nek la dublita "Mefisto".

5. Unu el la anoncitaj celoj de EKF estas "montri praktikan utilon de la internacia lingvo Esperanto kiel justa peranto de naciaj kulturoj". Ĉu vi ne opinias, ke magreco de E-kinoproduktado, male, pruvos praktikan neuzeblon de E-o sur tiu ĉi kampo (ĉu far produktantoj, ĉu far konsumantoj), kiom ajn justa la neŭtrala lingvo estu?

Feliĉe en tiu celo mi ne subkomprenas filmojn, kreitajn de esperantistoj en Esperanto. Tiam mi ekde la komenco spertus fiaskon. Kiel sola escepto de tiu E-filma agado, prezentanta naciajn kulturojn, povas roli Roman Dobrzyński, pola ĵurnalisto kaj reĝisoro de dokumentaj filmoj. Mi celis filmojn, kiuj enhavas unikan specifan etoson de naciaj kulturoj, absolute spektindajn, kiuj neniam estos tradukitaj en aliajn lingvojn, eble krom la angla, kaj pri kiuj la vasta aŭditorio neniam ekscios. Dank' al Esperanto la internacia E-komunumo povus ĝui neŭtralan prezenton de tiuj filmoj. En nia kazo estas la filmo "Ja tair ja tajer, Vojaĝo en Palestino", pri kiu ni eksciis pro unu el ĝiaj kreantoj, franca esperantisto.

6. Kio estas via tria celo: ĉu akcesora plifortigaĵo de la programo aŭ io senpere ligita al Esperanto? (aŭ: Deĉifru la 3-an celon de EKF-1. Ĉu daŭre temas pri kreaĵoj, ligitaj al Esperanto, aŭ pri io alia?) Kion signifas "sendependa

kinarto"? Kion signifas foresto de lingva cenzuro?
Ĉiu celo prifortigas la programon kaj estas natura sinsekvo de la daŭre ellaborata koncepto de la kinofestivalo. Alia problemo estas, ke la kinofestivalo dum la proksimaj jaroj serĉos sian niĉon kaj pro tio eksperimentos per diversaj direktoj kaj manieroj de agado. La ĉefa celo tamen restas kaj restos: prezenti ideon de Esperanto al ekstera publiko. Tion ni faros per specifaj agoj, kiuj povus altiri la atenton de la jam satiĝinta ĝenerala publiko. Unu el tiuj altirpunktoj estas sendependa kinarto. Ĝi iĝas pli kaj pli populara, ĉar la produktado por amasoj evidente celas nur financan profiton kaj pro tio elektas temojn kaj scenarojn, kiujn averaĝa spektanto povas senprobleme digesti. La sendependa kinarto ne dependas en la unua vico finance de grandaj filmoproduktantaj kompanioj, ekz. Holivudaj, sed plie ĝi ne dependas de la kutimaj temoj por ordinaraj homoj el amaso. Ĝi provas serĉi novajn freŝajn ideojn kaj stilojn, la ĉefaj trajtoj estas malgranda buĝeto kaj eksperimenta scenaro. La populareco de sendependaj filmoj estas granda, kaj precipe tiuj filmoj estas prezentataj dum kinofestivaloj ĉirkaŭ la mondo. Aliaj trajtoj de tiuj filmoj estas manko de baroj kaj stereotipoj moralaj, sociaj, politikaj. Ni kiel lingva movado aldonas al tiuj trajtoj mankon de naciaj kaj lingvaj stereotipoj.

7. Kaze, ke la sendependa kinarto estas akcesora, ĉu ne venos tempo, kiam ĝi iĝos la ĉefa kaj Esperanto denove marĝeniĝos?
Nur la tempo kaj reago de publiko montros al ni la ĝustan vojon. Esperanto ne estas la ĉefa parto de la Esperanta Kinofestivalo, ĝi estas natura helpilo kaj peranto, kia ĝi fakte devas esti laŭ ideo de Zamnehof. La Kinofestivalo estas unuavice ne pri-Esperanta aranĝo, sed per-Esperanta. Krom tio, la teamo de organizantoj estas tre kreema, ĝi daŭre eksperimentos.

8. Kio estas la krea unuiĝo "Filmoj sen limoj"?
Post la dujara funkciado de Verda Filmejo <www.filmoj.net>, kiu akumulis la plej grandan kolekton de subtekstoj en Esperanto, mi decidis iom ŝanĝi la direkton de mia prifilma agado. Verda Filmejo spertis ĉiam kritikon pri tio, ke la disdonado de videoj kaj subtekstoj estas kontraŭleĝa en multaj landoj. Inter niaj helpantoj kaj kunlaborantoj ni kreis *Google*-an dissendoliston, kiun ni nomis krea unuiĝo "Filmoj sen limoj". Ĝia celo estas kreado de modernaj laŭleĝaj aŭdvidaj materialoj, komence surbaze de la jam ekzistanta materialo kaj poste kreante sian propran. Ni jam sukcesis profesie dubli belegan kaj popularan dokumentan filmon kaj nun

pridiskutas kun la distribuantoj la detalojn. La ĉefa problemo en tio estas, ke la ekstera mondo de filmokreantoj kaj distribuantoj ne akceptas Esperanton serioze. Pro tio ni ĉiufoje devas klarigi, kio ĝi estas, kion ni celas kaj ke Esperanto daŭre vivas. Dank' al tiu agado ni jam sukcesis ricevi permeson kaj konsenton pri kunlaboro de filmokreantoj de 7 sendependaj filmoj. Ni sukcesis helpi kolekti monon por produkti DVD-on "Conlang: the movie" (Planlingvo: la filmo) de usona reĝisorino Marta Masferrer, kie esperantisto estas malheroo. Post tiu kunlaboro Marta en sia nova filmo "Asternauts" ekde la komenco proponis E-subtekstojn aŭ eĉ E-sontrakon en la oficiala DVD. "Filmoj sen limoj" helpis al usona reĝisoro Sam Green traduki la dokumentan filmon "The Universal Language" (La Universala Lingvo) en 16 lingvojn por la oficiala DVD.

9. Vi nomis du ĉefajn helpantojn el Brazilo: James Rezende Piton kaj José Roberto Tenório. Kiel distribuiĝis la taskoj inter vi tri?

James kaj José estis nur parto de la organiza teamo. Ili reprezentis surlokajn organizantojn, ili zorgis pri la kontaktoj kun LKK kaj interkonsentis pri kineja amfiteatro de la kongresejo, pri teknikaĵoj. La alia teamo helpis traduki materialojn en la portugalan kaj la anglan, tiuj ĉefe estis: Chuck Smith, Rogener Pavinski, Rafael Henrique Zerbetto, Cândido Ruiz, Fábio Silva kaj multaj membroj de BEJO (Brazila Esperantista Junulara Organizo). La alia teamo zorgis pri la idea koncepto, ĝi ĉefe konsistas el ruslingvaj esperantistoj, miaj amikoj kaj kreemaj konatoj, sed ĉiu el ili havas iun rilaton al Esperanto. "Filmoj sen limoj" zorgis pri la tradukoj kaj diskutadoj. Kaj la direktoro zorgis pri administrado, financoj, intertraktado kun filmofarantoj kaj filmodistribuantoj.

10. Se iu dezirus aliĝi al via afero, kiujn taskojn vi listigus?

Kiel ĉiam ĉiu bona naskiĝanta agado bezonas homfortojn. Depende de la kapabloj de homoj ni povas proponi diversajn taskojn: tradukadon, desegnadon, aspektigadon, tekstokreadon, recenzadon, administradon de retejo, filmoprilaboradon, muntadon, subtekstigadon, zorgadon pri eksteraj rilatoj, administradon de iu kinofestivala programo k.t.p. La teamo estas tre kreema kaj tre eksperimentema, do la kunlaboro por multaj homoj povus estis daŭra evoluo de iliaj kapabloj kaj lertoj, riĉigo de la sperto.

11. Ĉu vi estas kontenta pri EKF-1? Kio el viaj planoj realiĝis plej sukcese kaj kio malsukcesis?

Ĝenerale mi estas kontenta pri la unua Esperanta Kinofestivalo, ĝi donis al mi neimageblan sperton pri administrado kaj multan energion por la sekvaj tiaspecaj eventoj. Mi estis surprizita pri la kvalito de la kinejo kaj grandeco de la ekrano, mi ŝatis la teamon. Sed malgraŭ tio, estante perfektemulo, mi scias pri la fuŝoj, kiujn ni faris pro tempomanko kaj manko de sperto. La evento ne estis perfekta, sed, laŭ opinioj de spektantoj el postkongresa enketo, ĝi estis certe historia kaj sendube daŭriginda.

12. Kio estis la plej grava malfacilaĵo en preparado de EKF-1?

Deekstere tio povus aspekti frenezaĵo, ke mi loĝante en Rusio organizas la unuan tiaspece grandan eventon en alia duonglobo, ke la ĉefaj organizantoj neniam renkontiĝis vid-al-vide kaj eĉ loĝas en diversaj landoj. Tio estis la unua grava malfacilaĵo. La dua grava malfacilaĵo estis ricevi permeson de rajtoposedantoj de filmoj por prezenti tiujn en la Kinofestivalo. Kaj la tria malfacilaĵo estis kolekti subvenciojn kaj sponsorajn kontribuojn.

13. Kial vi decidis organizi EKF-1 en Brazilo dum la tri kongresoj, sed ne, ekzemple, en la pli proksima Kievo dum IJK aŭ en la patrujo, en Ĉeboksari dum REK?

La verajn kialojn esploros poste historiistoj, sed de nuna vidpunkto mi povas diri, ke nek IJK en Kievo, nek REK en Ĉeboksari konformis al la ampleksaj kondiĉoj, kiuj devus akompani la unuan en la vico, historian eventon. Verdire pri REK ni eĉ ne pensis, ĝi ne estis inter kandidatoj.

Mi antaŭsentis, ke la teamo de IJK ne estas kapabla paralele organizi kinofestivalon, ĉar mi dubis eĉ pri la ĉefa aranĝo: IJK. Feliĉe mi estis prava.

Unu el plej konvinkaj punktoj de la tri brazilaj kongresoj estis aktiva brazila esperantistaro, kiu plej aktive montras sin en E-kinarto. Krom tio, la plejparto de kunlaborantoj de Verda Filmejo estis el Brazilo kaj por mi estis vera honoro organizi la unuan Kinofestivalon ĝuste tie kiel mian dankon pro ilia fervora laboro. Dum 4 monatoj ni bonŝancis trovi kinejon laŭ nia programo kaj niaj rimedoj, membroj de LKK tre bone akceptis la proponon pri la plia arta evento kadre de la tri kongresoj, kaj mi neniam bedaŭris pri mia decido.

14. Ĉu vi intencas organizi EKF-2; se jes, kiam kaj kie?
Ni decidis organizi EKF-2. La loko nun estas esplorata, tutcerte ĝi estos en Eŭropo. La aranĝo estos aparta arta kultura evento kun riĉega programo, alloga ankaŭ por neesperantistoj, kun multaj artaj prezentoj, vivaj renkontoj kun filmofarantoj, artaj metiejoj kaj multaj surprizoj. Kiu maltrafos ĝin, bedaŭros dum la tuta sekva jaro.

15. Kial vi ŝatus fari la sekvajn EKF ekster E-aranĝoj?
La kinofestivalo dum iu E-aranĝo en la sama kongresejo estas fermita poresperantista aranĝo, kaj ĉar kutime la kongresejo estas tre buĝeta konstruaĵo, mankas al ĝi bona teknika ekipaĵo, kaj la kinofestivalo ne diferencos de la kutimaj filmaj prezentoj. Nia evento celas neesperantistan publikon kaj tute alian nivelon de organizado, tute alian programon. Ĉar la eventuala programo de la kinofestivalo estas riĉega, ĝia okazigo antaŭ aŭ post iu granda E-aranĝo kiel aparta aranĝo estas pli taŭga de nia vidpunkto kaj de la vidpunkto de respondintoj de la enketo.

Dankon, Aleksander! Multajn sukcesojn al via plia agado!

***

<u>Nekonkursa programo</u>

La nekonkursan programon partoprenis 15 filmoj el 7 landoj en kvar temoj.

La mondo pri Esperanto: "The Universal Language" (Sam Green, Usono); "Esperanto" (Dominique Gautier, Francio); "Que sera, sera" (Geir Greni, Norvegio); "Conlang: the movie" (Marta Masferrer, Usono).
La verda temo: "La Patro" (Joe Bazilio, Brazilo); "Senmova" (Tuğçe Madayanti Sen, Turkio); "Ĉapeloj" (Simmon Keith Barney, Usono); "Atako de lunaj zombioj" (Christopher R. Mihm, Usono).
La nacia temo: "Polaj Spuroj" (Rogener Pavinski, Brazilo); "Ja tair ja tajer, Vojaĝo en Palestino" (Jean Causse, Raimon Gaffier, Matthieu Gauvain kaj Jean-Baptiste Jullian, Francio).
La arta temo: "Vundoj", "Anzhelina", "Kaj velkaj floroj floras", "Ĉi-nokte Patro Kristnasko mortis" (Martin Schreier, Germanio); "The Cost of Living" (Lloyd Newson, Britio).

KIO ESTAS LA REALA TREZORO DE REU?

Ĉi tiu artikolo aperas pli-malpli samtempe en du gazetoj: "La Ondo de Esperanto" kaj REGo. Mi dankas ties ĉefredaktorojn – sinjorojn Aleksander Korĵenkov kaj Georgij Kokolija – pro la tre amika konsento publikigi neekskluzivan materialon.

Oktobre 2011 finiĝas mandatperiodo de la nuna Estraro de Rusia Esperantista Unio (REU), kaj per ĉi tiu artikolo, kiu nepre ne estas laŭvorta raporto pri la farita agado, mi prezentas kelkajn ideojn pri la Unio kaj E-movado ĝenerale, kiuj aperis dum ĉi tiu tempo. Io estis koncize dirita en mia intervjuo por "La Ondo de Esperanto" (julio 2011), sed nun mi volas pli detale prikomenti la situacion. Ĉar ĉio sube menciita estas nur mia opinio, mi ne aldonu post ĉiu tezo la vortojn "laŭ mi", ĉar tio estas memevidenta.

Sendube nia lando estas integra parto de la mondo, kaj ni alfrontas la samajn problemojn, kiel la planedo entute. Inter tiuj problemoj estas malaltiĝo de valoro de Esperanto kiel internacia komunikilo. La angla dominas jam delonge, sed la fulma evoluo de teknologioj nun ebligas ĝin reale uzi ĉiutage, ne elirante el la hejmo kaj foje eĉ simple tenante poŝtelefonon enmane – afero, kiu praktike ne estis imagebla proksimume antaŭ la jaro 2000. Pere de Interreto oni povas rapide interkomunikiĝi en baza (foje eĉ primitiva) angla kaj esti tute kontenta pri la rezulto: oni povas nun ekscii ĉiun necesan informon kaj konversacii kun ajna homo sen apliko de Esperanto. Sendube homo, kiu jam estas esperantisto, preferus demandi alian esperantiston pri io ne ligita kun la movado, sed konvinki neesperantistojn pri tio estas malfacile (kaj foje eĉ tute neeble – ekzemple, oni neniel povas rezervi hotelĉambron aŭ trajnbileton, uzante Esperanton, sed uzante la anglan jes povas, kaj foje uzante *nur* la anglan). Ankaŭ akirado de amikoj funkcias bonege preter Esperanto – pere de sociaj retoj (*Facebook*, *Vkontakte* k.a.). Senpaga vojaĝado pere de Pasporta Servo – unu el tracidiaj E-allogaĵoj – ne (plu) estas unika, ĉar jam delonge ekzistas similaj neesperantlingvaj servoj kiel *Couchsurfing*, *Hospitality Club* ktp. Do kiel baza kaptilo ĉefe restas lingvistika interesiĝo kaj absolute ĥimera, nepalpebla kaj malfidinda "Esperanta etoso". Tio estas universala problemo. Sed krome gravas ankaŭ tio, ke por rusianoj estas sufiĉe malfacile ellerni fremdan lingvon, kaj preskaŭ ĉiuj prave direktas siajn fortojn por lernado de la angla, franca ktp, kiuj estos nepre utilaj por ili, malkiel Esperanto. Oni memoru, ke averaĝa homo ne posedas elstarajn lingvajn kapablojn, kaj, se konsideri fortojn kiuj estas elspezendaj por tia studado, por Esperanto restas malmulta *motivado*. Mi ne diras, ke ellerni Esperanton fariĝis malpli facile ol pli frue, sed nun jes estas malpli facile trovi motivon kaj

konvinki homojn por tio.

Pro grava maldensiĝo de alfluo de novaj homoj kaj pro tio, ke malnovaj E-aktivuloj fojfoje malaperas – ĉu pro forpaso, ĉu pro definitiva estingiĝo de la deziro okupiĝi pri Esperanto, ĉu pro aliaj aferoj, aperas problemo kiu jam senpere tuŝas REU: kvanto de novaj aktivuloj, kiuj pretas aktivi en REU, estas preskaŭ nula. Notu, ke ne temas pri novaj esperantistoj entute.

En nia lando ja estas homoj kiuj efektive estas aktivaj kaj faras multajn utilajn aferojn por E-movado. Bedaŭrinde ili estas malmultaj, sed ili jes ekzistas. La problemo estas, ke ili okupiĝas pri siaj aferoj, kiujn ili elpensis, "naskis", kaj nun vartas kaj prizorgas. Tio estas privataj iniciatoj. Oni komprenas, pri kio temas – pri kluboj (ekzemple – MASI, gvidata de Irina Gonĉarova), pri eldonejoj ("Sezonoj", "Impeto"), pri redaktoroj (REGo, "La Ondo...", iom pli frue – "Komencanto"), pri vortaristoj (fakte *la* vortaristo, ĉar nun ĉefe temas pri Boris Kondratjev), pri retaj aktivistoj, kiuj gvidas plurajn retejojn (Andrej Grigorjevskij, Vjaĉeslav Ivanov), pri organizantoj de certaj renkontiĝoj – regionaj, tutlandaj kaj internaciaj – kaj kelkaj aliaj.

Krome oni konsciu, ke la angla vorto "brand" (ni traduku ĝin "vendomarko") estas ne simpla vorto. "Sezonoj" estas vendomarko. "Impeto" estas vendomarko. REGo estas vendomarko. La granda Rusa-Esperanta vortaro, kvankam ĝi ankoraŭ ne aperis, jam estas vendomarko, eĉ se nun malpli kosta, ol aliaj (oni kredu, ke post la apero la situacio ŝanĝiĝos). Ankaŭ REU estas vendomarko, sed bedaŭrinde ne tre altvalora. Sekve neniu racia persono pretas transdoni sian vendomarkon al REU. Sed vendomarko ja estas *vendo*marko, do teorie ĝi estas vendebla-aĉetebla, sed REU ne estas aĉetopova. Tamen posedantoj ne farus tion ne nur financrezone. Ja unuavice ili (posedantoj) volas, ke ilia afero ekzistu plu almenaŭ sur la sama nivelo kiel antaŭe, kion neniu anticipe povas garantii. Samtempe preskaŭ neniu el posedantoj de siaj E-entreprenoj havas sufiĉe da tempo por ion fari por REU. Estas kelkaj, sed nemultaj, kaj ilia agado, kvankam ĉiuokaze aprezinda, ne kovras ĉiujn problemojn.

Sed tio estas nur unu flanko de la problemo. La alia estas pli grava kaj pli ampleksa, kvankam nomebla koncize: *neniu bezonas ion ajn*. Homoj en Rusio pretas pagi siajn kotizojn, kaj ja pagas, homoj subtenas nin per vortoj, sed reale ili nenion bezonas. La afero estas pruvebla per du facilaj ekzemploj. REU lanĉis retejon <e-kluboj.ru> – surbaze de vikia teknologio. La ideo estis unuigi en unu retejon informojn pri ĉiuj kluboj de Rusio. Dank' al vikia motoro informo estas korektebla facilege kaj do teorie povas esti aktualigata eĉ ĉiusemajne, se necesas. Post ĉiuj preparlaboroj (aĉeto de retnomo, teknika agordo, mana kreado de paĝoj por ĉiuj urboj), kiam venis tempo por plenigi la paĝojn per informoj – afero en si mem simpla, postulanta ne pli ol duonhoron, aŭ eĉ malpli – estiĝis silento. Evidentiĝis, ke homoj tion ne bezonas, kvankam mi daŭre opinias la ideon tre bona, speciale kiam temas pri tiom granda lando kiel Rusio. Mi povus, sendube, atingi la rezulton per senĉesa bombardado per leteroj kaj memorigoj, sed por tio mankas tempo. Neformala nomumo de persono, kiu ŝajne pretis respondeci, ankaŭ estis senutila. Povas esti, iam en estonto mi tion faros mem...

Alia ekzemplo estas nova retejo de REU <reu.ru>. Ĝin faris Andrej Grigorjevskij, elspezinte por tio kolosan tempon. Krom ekstera aspekto (kiu, konsciate, ne estas supermoderna, sed almenaŭ pli aktuala, ol estis pli frue), ĝi enhavas ankaŭ multegajn internajn funkciojn, kiuj estas atingeblaj por simplaj uzantoj (ne nur por administrantoj). Statistiko montras, ke la retejo estas sufiĉe malvaste uzata. Ne pro komplikeco – ĝi estas facilega, kaj ĉiam oni pretas helpi pri ĝi. Sed pro tio, ke homoj ne multe bezonas ĝin.

Antaŭ la elektiĝo ni multe pensis pri la Libroservo, pri ĝia reformo kaj modernigo. Estis atingita interkonsento kun privata persono, kiu pretis pagi grandan monsumon el propra poŝo por krei retan librovendejon de REU. Poste mi rezignis la ideon, ĉar jam ekzistas tia vendejo en alia loko kaj dubli aferojn estus stulte. Sed mi rezignis ne nur pro tio. Evidentiĝis, ke tio estus vana perdo de mono kaj tempo, ĉar laŭ ĉiuj prognozoj la vendejo estus tre malofte uzata – ĉiuj libroj estas aĉeteblaj senpere ĉe eldonejoj aŭ ekzistantaj perantoj, kaj REU ne havas proprajn librojn por vendi (nu, fakte ĝi havas, sed ne tiom multajn por krei retan vendejon tiucele).

Sed tio ne estas sufiĉa kaŭzo por ne plu aktivi en la reto – eĉ male. Se ni ne volas ĝenerale postresti, ni ne nur devas sekvi aktualajn tendencojn, ni devas ankaŭ "montri ekzemplon" de moderneco. Ni devas "enretigi" laŭeble plej multajn kutimajn servojn. La unuaj paŝoj estas sukcese faritaj – ni transiris al nur-retpoŝta dissendado de "Bulteno de REU". Ni klopodas (kvankam ne ege sukcese pro tempomanko) aktivi en sociaj retoj. Ni esperas baldaŭ enretigi la tutan arkivon de la gazeto REGo. Krome mi planas proponi al la membraro oficialigi distancan partoprenon en REU-konferencoj kaj akcepti plej gravajn decidojn (temas pri ŝanĝoj en la Ĝenerala regularo, probable eĉ elekto de la Estraro) rete – do anstataŭ poŝta voĉdonado transiri al retpoŝta. Tamen mi tute ne celas, ke Konferencoj estas ne plu bezonataj. Diskutado kaj "vivaj" konversacioj estas same bezonataj, kiel pli frue, kaj neniu reta interkomentado tion anstataŭos. Sed ni devas konscii ŝanĝojn en la mondo – se plejparto de la membroj ĉiuokaze ne povas veni al ĉeesta Konferenco, sed povas alimaniere partopreni laboron de la Unio, kial ni malpermesu tion al ili?

Unuigante la du bazajn supre menciitajn problemojn oni povas konkludi: se homoj nenion bezonas, sendube ili ankaŭ ne pretas aktivi. Trovi homojn por multaj taskoj, kiuj ja abundas, estas malpli facile. Oni ne povas simple nomumi kaj devigi homojn ion fari – nun estas alia tempo. Same ne funkciis en REU teorie bonega sistemo, proponita antaŭ du jaroj – konsilio de spertaj esperantistoj kun "teknika" Estraro (kvankam oni notu, ke el lingva vidpunkto konsilio ne povas esti super estraro, ĉar estraro ja estras, do ĝi devus nomiĝi alimaniere, sed tio ne gravas). La sistemo vere estas bonega, sed ĝi montriĝis ne funkcikapabla en niaj kondiĉoj – kvankam troviĝis plenumantoj ("teknika" Estraro), kiu faris sian laboron tute bone, la konsilio mem ne povis funkcii pro multegaj kialoj, inter kiuj estas troamasiĝo de homoj tie, pro personaj miskomunikaj problemoj, sed ankaŭ pro tio, ke homoj reale malmulton bezonas ekster siaj privataj interesoj.

Kial sufiĉe multaj homoj daŭre pagas kotizojn al REU? Mi pozitive miras, sed ne scias. Verŝajne, pro bona rilato al la movado kaj pro deziro iel subteni ĝin, eĉ se multaj el ili havas sufiĉe nebulan imagon pri ĝi, pri la movado. Sed tio estas avan-

taĝo kaj en tio mi vidas realan perspektivon. REU ricevas iom da mono – ĉu per kotizoj, ĉu per io alia (vendado de varoj, fojfoja okazigo de renkontiĝoj). Krome REU posedas sian ĉefan trezoron – la membraron. Niaj membroj estas personoj, kiuj ne nur pagas kotizojn, sed ankaŭ havas unikajn spertojn, diversflankajn movadajn sciojn kaj scipovojn, kio estas uzinda. Sekve REU povas esti centro de subteno (ne nur financa) de apartaj iniciatoj. Tio estas vere perspektiva vojo por REU, kaj ni strebos tion efektivigi laŭ niaj modestaj povoj.

Grigorij Arosev, Prezidanto de REU

LA PREZIDANTO DE REU MALSUKCESIS, ĈAR *"NENIU BEZONAS ION AJN"*

Mi estis tre ĉagrenita, traleginte jam la duan pesimisman artikolon pri Esperanto-movado en Rusio kaj la monda movado ĝenerale, kiun verkis la Prezidanto de REU Grigorij Arosev. Ambaŭ artikoloj estas se ne rekte kontraŭesperantistaj, do konkrete malentuziasmigaj por la rusiaj esperantistoj. Sed ĉefe pluraj informoj en ili estas malaktualaj aŭ malobjektivaj, kio misgvidas la legantojn, kiuj ne tre bone konas la detalojn, menciitajn en ili.

La lasta artikolo havas la titolon "Kio estas la reala trezoro de REU?" (La Ondo de Esperanto 2011, №10 (204); REGo № 4 (66), oktobro 2011; jam la 20-an de septembro ĝi aperis ankaŭ en la retpaĝo, nomata "La Balta Ondo"). Pli frua artikolo estas intervjuo kun G.Arosev kaj havas la titolon "Ĉu Esperanto povas doni ion principe novan al la mondo?" (La Ondo de Esperanto, 2011, №7 (201), intervjuis Aleksander Korĵenkov).

Mi opinias, ke tiaj artikoloj estas malobjektivaj kaj malutilaj por la Esperanto-movado ĝenerale, kaj plej malbonas ke tiaj artikoloj devenas de la homo, kiu prezidas landan Esperanto-asocion.

Grigorij komencas la artikolon per iuj dubindaj kaj apenaŭ aktualaj nuntempe supozoj, kiujn kutime uzas malbone edukitaj kontraŭuloj de Esperanto.

Ekz. li skribas: "... Inter tiuj problemoj estas malaltiĝo de la valoro de Esperanto kiel internacia komunikilo. La angla dominas jam delonge, sed la fulma evoluo de teknologioj nun ebligas ĝin reale uzi ĉiutage...". Min interesas: kiujn informajn fontojn uzis Grigorij por konstati, ke Esperanto nuntempe havas malpli da valoro, ol antaŭe, rilate al la internacia komunikado?

Krome, mi havas grandan sperton de la internacia komunikado pere de la diversaj retoj kaj povas konstati, ke la angla pro la apero de Interreto multon perdis, ĉar la modernaj teknologioj, plejparte rilataj al la diversspecaj tradukiloj kaj interpretiloj, ne postulas de la uzantoj konon de la angla lingvo por ĉiutaga komunikado, legado de scienca, teknika k.a. enhavo. Do, oni bezonas nek la anglan, nek Esperanton, nek iun alian fremdan lingvon por iĝi ano de la granda kaj komplika reta informsistemo.

Poste la aŭtoro nomas la Esperanto-etoson "absolute Ĥimera, nepalpebla kaj malfidinda", kion mi traktas kiel rektan ofendon de pluraj esperantistoj el la tuta mondo. Sed ja Esperanto-etoso pri kiu tiom dubas la nuna Prezidanto de REU estas

absolute reala afero de Esperanto-renkontiĝoj, kaj tion konstatas ankaŭ pluraj neesperantistaj atestantoj. Kiom da internaciaj kaj enlandaj E-renkontiĝoj vi, Grigorij, partoprenis dum la pasintaj du-tri jaroj? Kiujn konkrete? Ĉu vi vizitadas Moskvan E-klubon?

La homa mondo iĝis multe pli varia, modernaj homoj preskaŭ ĉiam povas elekti la okupojn laŭplaĉe, kio diferencigas ilin de la homoj el pasinteco. Grigorij skribas, ke nun por konvinki neesperantistojn lerni Esperanton "... estas malpli facile trovi motivon...". Mi konsentas, tamen la motivoj por tio nuntempe estas signife pli multaj, ol antaŭe, kaj feliĉe ili ne estas limigitaj per teorio, ke Esperanto estas pli simpla, ol la angla.

Sekve la Prezidanto de REU kiel la dogmon proponas al ni, ke okazas la "maldensiĝo de alfluo de novaj homoj" al Esperanto-mondo. Poste li ligas tion al la malkresko de membrokvanto de REU, kaj eĉ supozas, "... ke ne temas pri novaj esperantistoj entute". En la lasta frazo li tute pravas. Do, eblas konstati, ke la problemo de la membra malkresko estas problemo nur de REU kiel organizo, kaj ĉefe ĝin kaŭzis la politiko de la REU-Estraro kaj ĝia Prezidanto (ne nur la nuna, sed ankaŭ la antaŭaj). La ĝenerala kvanto de Esperanto-parolantoj en Rusio kaj en la aliaj landoj pli-malpli kreskas ĉiujare, kion verŝajne kaŭzis la disvolviĝo de Interreto kaj kion konstatas jam pluraj spertuloj de Esperanto-movado. Novaj esperantistoj en Rusio estas iom aliaj, ol antaŭe, kaj vidas neniun realan bazon por la agado ĉe REU, ili ne vidas strukturon de la movado, kiu estus merita por aliĝi, pro tio ili agas ekster tiu organizo kaj, ni diru, multe pli efike kaj videble agas.

Interparolas juda patrino kun filino antaŭ ŝia edziniĝo:

– Mi scias, filineto, ke ĝi estas ĝena afero... Proksimiĝas via edziniĝo, kaj mi devas vin instrui...

– Sed panjo, mi ĉi tion ne bezonas.

– Sara, silentu, ne kontraŭu. Vi junulinoj pensas, ke vi ĉion jam scias... Jen, dum ordigado de via hejmo vi neniam kovru ŝrankajn bretojn per gazetoj. Ĉar tiam ĉiuj scios, kiam vi lastfoje ordigis vian hejmon!

juda humuraĵo de Josef Shemer

Sekve Grigorij vere konstatas, ke ekzistas multaj homoj, kiuj aktive okupiĝas pri Esperanto-movado, kaj li skribas: "La problemo estas, ke ili okupiĝas pri siaj aferoj, kiujn ili elpensis, "naskis", kaj nun vartas kaj prizorgas." Sinjoro Prezidanto, tio ne estas la problemo. La homo devas okupiĝi pri tio, pri kio li volas kaj kapablas okupiĝi, male rezultiĝas kutime iu stultaĵo! Krome Grigorij ĉi-artikole montras la propran malbonan konon de rusia kaj ankaŭ de la internacia Esperanto-movado kaj kulturo. Li montras la bildon de Rusia Esperanto-aktivado, kiu estis aktuala eble antaŭ ĉ. 10 jaroj. En liaj ekzemploj tute mankas la elstaraj rusiaj kaj ruslingvaj Esperanto-projektoj. Ekz. Universitato "Justo", kiu situas en Moskvo, devige kaj oficiale instruas Esperanton. Ĝi ankaŭ disponigas ejon por la Moskva E-klubo kaj la pluraj E-renkontiĝoj. Krome, ĝi foje organizis sciencajn esperantologiajn konferencojn sur la nivelo de la rusiaj ŝtataj ministerioj. Krome ekzistas pluraj regionaj E-movadoj, kiel ekz. en Ĉeboksari, Peterburg, Tiĥvin, Jekaterinburg

k.a. Estas dubinde, ke la nuna Prezidanto ankaŭ neniam aŭdis pri la lingvaj festivaloj, kiuj okazas ĉiujare jam en kelkaj rusiaj urboj, pri la aktivado de la universitataj instruistoj (en Moskvo, Peterburg, Ivanovo, Krasnojarsk k.m.a.), rilate al Esperanto, pri la aktivado de REU-membroj kaj ceteraj rusiaj esperantistoj kadre de la internaciaj Esperanto-projektoj. Ne estis menciitaj ankaŭ pluraj ofte vizitataj ruslingvaj kaj esperantlingvaj diversnivelaj retejoj pri Esperanto, kiujn kreas la aktivuloj el pluraj regionoj de Rusio. Parolante pri la vortaristoj, Grigorij absolute forgesis, ke pluraj aktualaj eldonoj kun milaj eldonkvantoj de diversspecaj lerniloj (ankaŭ vortaroj) nuntempe estas disponeblaj en dekoj de la plej grandaj rusiaj librovendejoj kaj amaso de la interretaj. Tiuj lerniloj estas oficiale eldonitaj kaj estas sufiĉe sukcesaj dank' al la aktivuloj de Esperanto-movado en Rusio kaj eksterlando. La malbonan konon de la rusia Esperanto-kulturo la nuna REU-Prezidanto montris ankaŭ en la pasintfoja intervjuo por *La Ondo de Esperanto*. Li tiam diris, rilate al Rusia E-literaturo: "En nia lando oni publikigas kaj eldonas nur unu aŭtoron, kaj tio ne estas lia kulpo – li verkas laŭ siaj fortoj kaj talento. Evidentas, ke redaktorojn kaj eldonistojn ne interesas aliaj nomoj". En Rusio en Esperanto estas eldonataj pluraj rusiaj kaj eksterlandaj aŭtoroj kaj nuntempe neniu el ili estas eldonata signife pli ofte, ol la alia. Estas evidente, ke pluraj rusiaj esperantistoj povas trovi en tiu ĉi frazo de la Prezidanto iujn politikajn superstiĉojn, kiuj estis aktualaj en bataloj en la rusia Esperanto-movado antaŭ multe pli ol dek jaroj, sed ne nun.

Sekve Grigorij nomas kelkajn Esperanto-entreprenojn en Rusio ("Sezonoj", "Impeto", REGo kaj REU) "vendomarkoj", miksante la ofte uzatajn kun diversaj sencoj anglalingvajn terminojn "brand" kaj "trade mark" el la reklamsciencoj kaj sciencoj pri la publikaj rilatoj k.a. Kara Prezidanto, unuavice REU estas ne "brand", sed la socia publika organizo, kiu ne havas komercajn aŭ iujn aliajn privatajn celojn, sed strebas plenumi la taskojn, kiujn komisiis al ĝi ĝiaj membroj. Ĉio cetera venas poste.

Sekve Grigorij skribas, ke "*neniu bezonas* ion ajn" en la rusia Esperanto-movado, kaj poste ege strebeme provas klarigi kial. Sinjoro Prezidanto, vi mensogas – mi bezonas, mia edzino bezonas, miaj gepatroj bezonas, miaj amikoj bezonas... Kion vi povas proponi al ni? Jes, nenion!

Unu el la ekzemploj de Grigorij pri la "pigremo" de la esperantistoj en Rusio estas la retejo <e-kluboj.ru>. Pri ĝi sinjoro Arosev en ĉi artikolo skribas: "Evidentiĝis, ke homoj tion ne bezonas, kvankam mi daŭre opinias la ideon tre bona, speciale kiam temas pri tiom granda lando kiel Rusio". Mi komencu per la demandoj: kion la Prezidanto de REU kaj la Estraro faris por disvastigi la informojn pri la nova retejo? Ĉu vi verkis grandajn klarigajn kaj inspirajn artikolojn pri ĝi al REGo, "La Ondo..." k.a. amaskomunikiloj? Ĉu vi reklamis ĝin vaste tra la sociaj retoj? Ĉu vi persone senĉese turmentis plurajn E-klubojn tra Rusio? Ĉu vi faris vastan prezentadon de la projekto almenaŭ en la E-klubo de la urbo, kie vi loĝas? Ne! Post tio vi skribas en via intervjuo al "La Ondo de Esperanto": "Sed bedaŭrinde mi renkontis preskaŭ plenan indiferentecon pri la afero flanke de lokaj kluboj". Kaj en la nuna artikolo: "Samtempe mi volas emfazi, ke esperantistoj en Rusio ĝenerale estas nesufiĉe aktivaj". Via privata projekto fiaskis, ĉar vi eĉ ne provis iel disvas-

tigi ĝin. Mi povas konstati, ke se la Prezidanto de REU estas nesufiĉe aktiva en Esperanto-movado, ne necesas kompari lin kun la ceteraj movadanoj en la lando. Krome, se la diskuto denove venas al la retejo <e-kluboj.ru>, mi kiel spertulo pri la retaj aferoj kaj plenuminto de kelkaj sukcesaj retaj Esperanto-projektoj (kaj ne nur) povas konstati, ke ĝenerale la ideo de la retejo dekomence estis malbone pripensita. Mi ne malkovros ĉiujn ideojn ĉi-rilate, sed pli bonus ekzemple uzi la Vikipedion, ĉar tutegale tie estas uzata la "vikia teknologio". Oni povas facile aldoni al la Esperanto-versio de tradicia Vikipedio la informojn pri E-kluboj en Rusio, kiujn vidos diference de la <e-kluboj.ru> ne nur iuj hazardaj vizitantoj, sed ĝenerale la tuta internacia Esperanto-mondo. Ankaŭ la aldono de la samaj informoj, sed ruslingvaj al la rusa parto de la tradicia Vikipedio povus fari bonan reklamon por Esperanto en Rusio.

Tamen, por krei portalon pri rusiaj Esperanto-kluboj indus uzi la retejon <reu.ru> kune kun ĝia profil-sistemo (ĝian subdomajnon aŭ subdosierujon). Kial tio ne estis farita? Ĝenerale eblas konstati, ke la projekto ekde la komenco estis pure privata afero, neniel rilata al la organizo, ĉar la domajno <e-kluboj.ru> estas registrita ne nome de REU (kiel tio estas pri <reu.ru>), sed kiel privata propraĵo de persono, kiu jure havas ĉiujn rajtojn pri ĝi.

Sekve Grigorij skribas pri la retejo de REU kaj konstatas: "La statistiko montras, ke la retejo estas sufiĉe malvaste uzata". Vidu, la rusiaj esperantistoj ne estas la problemo de tio, la problemo estas la metodo de la ĝenerala malmoderna kaj stagna reta politiko de REU. Tio ankaŭ rilatas al la <e-kluboj.ru>. Ni kreis sufiĉe sukcesan internacian informcentron pri la gazetara kampanjo, kiun komisiis al ni UEA ĉirkaŭ la Universala Kongreso en Kopenhago. Ekzistis multaj malfacilaĵoj, ankaŭ rilate al la malaktiveco de la esperantistoj, sed ni neniam verkis fatalismajn artikolojn, ke ĉio estas malbona. Kaj ni sukcesis! Mi invitas ĉiujn esperantistojn el Rusio, kiuj ankoraŭ ne aliĝis al <Esperanto.com>, aliĝi kaj informi pri la kluboj kaj Esperanto-agado en siaj urboj!

Mi miras, ke REU eĉ ne provis konsulti la profesiulojn pri retaj aferoj, kiuj feliĉe en Esperantujo abundas, sed okupiĝis pri iuj "amatorecaj" agoj.

Poste la Prezidanto de REU Grigorij Arosev skribas pri sia rezigno rekrei kaj evoluigi la Libroservon de REU. Tion li promesis en sia prezidanteca programo. Li skribas, ke jam ekzistas en Rusio la libroservo kaj pro tio REU ne bezonas la alian. Denove aperas la demando pri kompetenteco de la Prezidanto, rilate al la kulturo kaj literaturo en Esperanto. Ĉu la Estraro kaj la Prezidanto de REU kontaktis ĉiteme la internaciajn organizojn por helpi al la rusiaj esperantistoj akiri librojn de la pluraj Esperanto-eldonejoj tra la mondo? Ne! Kio rezultiĝas? Esperantistoj en Rusio ne povas ricevi helpon de REU por akiri Esperanto-literaturon ĉu en Rusio, ĉu ekster ĝi.

Poste Grigorij skribas pri la aktivado en la reto. Ĉiuj priskribitaj de li agoj, kiujn faris REU, estas fareblaj de unu eĉ malsperta ĉi-teme persono maksimume dum 2-3 tagoj. Oni jam konstatis fiaskon de la disvastigo de REU en la sociaj retoj, ĉar ĝiaj grupoj ie videble aperis eĉ malpli, ol ĉe la rusia reto "Vkontakte" (tie ĝi ankaŭ estas malmultnombra kaj malaktiva).

Krome la Estraro kaj la Prezidanto de REU neniel aktivas en la internacia Esperanto-movado, internaciaj sociaj retoj, kio povas montri la ĝeneralan malintereson de ili pri la evoluo kaj disvastigo de Esperanto kaj informado de la eksterlandaj esperantistoj pri la rusia Esperanto-movado.

Dmitrij Ŝevĉenko (Moskvo)

UEA SUKCESE AKTIVIS ĈE UN-KONFERENCO

Kvin reprezentantoj de UEA partoprenis la ĉi-jaran Konferencon de Neregistaraj Organizaĵoj, kiun la Departemento pri Publika Informado (DPI) de Unuiĝintaj Nacioj okazigis en Bonn (Germanio) de la 3-a ĝis la 5-a de septembro. Tiu ĉi plej grava ĉiujara evento de UN por NRO-j okazis la 64-a fojon kaj havis la temon ***Daŭrigeblaj socioj – respondecaj civitanoj***. La konferencon malfermis Kiyo Akasaka, asista ĝenerala sekretario de UN pri komunikado kaj publika informado. Ĝenerala sekretario Ban Ki-Moon salutis la inaŭguron per videomesaĝo.

Kiel delegitoj de UEA partoprenis Marcus Cramer, Stefano Keller, Mélanie Maradan, Julia Noe kaj Manfred Westermayer. Dum la konferenco ili havis multajn okazojn por interparoli kun reprezentantoj de aliaj NRO-j kaj interŝanĝi ideojn, informilojn kaj kontaktkartojn.

La teamo de UEA aktive diskonigis la starpunktojn de UEA pri lingvaj rajtoj, komentante i.a. tion ke nur la angla estis la laborlingvo de la konferenco. Al la demando de Keller pri la kialo, Maria-Luisa Chávez, ĉefino pri la rilatoj de UN kun NRO-j, respondis, ke tion kaŭzis nur manko de mono. Ankaŭ ŝi bedaŭris la neeblon uzi pli da lingvoj.

Dum unu el la rond-tablaj diskutoj Keller revenis al la afero post elpaŝo de reprezentanto de *PepsiCo*, kiu prezentis la klopodojn de sia firmao subteni la evoluon en la diversaj mondopartoj, kie ĝi fabrikas kaj vendas siajn varojn. Keller demandis, ĉu *PepsiCo* ne povus per subvencio ebligi ankaŭ ĉe similaj konferencoj uzon de aliaj oficialaj lingvoj de UN ol nur la angla, se ĝi jam faras tiom vastan "homhelpan" laboron. La estrarano de UEA ricevis la respondon, ke pri tio oni skribu al la oficejo de *PepsiCo*. La sama respondo venis ankaŭ al lia demando, ĉu la firmao, kiu ĉeestas en tiom da lingvoregionoj, ne povus meti ankaŭ Esperantajn vortojn sur siajn varojn.

Ĉe la rond-tabla diskuto pri civitana partopreno, Mélanie Maradan demandis, kiel la prelegantoj imagas la partopreneblon en tiu diskuto kaj en surloka agado ekz. de indiĝenaj popoloj, se oni uzas nur la anglan. Ŝi rimarkigis, ke ĝuste la koncernatoj ne povas partopreni en la diskuto kaj ke en la konferenco multaj reprezentantoj ne povas interveni pro nesufiĉa kono de la angla. Maradan demandis, kion oni intencas fari por solvi tiun problemon, sed ŝi ne ricevis respondon.

La delegitoj de UEA ĉeestis kelkajn laborgrupojn, kie ili aldonis al la diskutoj menciojn pri la neceso konsideri la rajton de ĉiu popolo je uzo de sia gepatra lingvo kaj je plukultivado de sia kulturo.

En kunsido kun la ĉefino kaj la stabo de la NRO-rilatada oficejo de UN Stefano Keller alparolis en Esperanto kun angla interpretado de Marcos Cramer. Li komentis diversajn kontakt- kaj informkanalojn de UN, kiu pli kaj pli uzas *Facebook*,

Twitter kaj *Youtube* por rilati kun la civila socio. Kiel ekzemplon pri la agado de UEA, Keller menciis la novan retejon kreitan en Novjorko, kiu informas la esperantistaron pri la laboro de UN. Manfred Westermayer alparolis pri projekto realigata de esperantistoj en Afriko.

Jam komence de la konferenco estis publikigita malneta projekto de la fina deklaro, pri kiu la ĉeestantaj NRO-j povis komenti kaj fari proponojn pri ŝanĝoj kaj aldonoj. La teamo de UEA proponis aldonon de frazoj pri lingva diverseco kaj lingvaj rajtoj, pri kiuj la tekstoprojekto tute silentis. Post la konferenco la respondeculoj pri la fina deklaro daŭrigis la traktadon de la ŝanĝoproponoj, akceptante ĉiujn faritajn de la delegitaro de UEA. La amendoj pri lingvaj rajtoj, proponitaj de UEA, eniris la definitivan version de la fina deklaro.

Neniam mi vidis tiom da mencioj pri lingvo, lingvaj rajtoj kaj diverseco en UN-dokumento, komentas kun kontento Stefano Keller. En la originala projekto de la deklaro la vorto "lingvo" aperis eĉ ne unufoje, li aldonas. Eĉ du komplete novaj alineoj proponitaj de UEA estis akceptitaj. La plej rimarkinda el ili troviĝas inter la rekomendoj al "Rio + 20", t.e. Konferenco de UN pri Daŭripova Evoluo, okazonta en Rio-de-Ĵanejro en junio 2012. Ĝi tekstas:

Ni alvokas por respekto al kaj inkludigo de etnaj lingvoj en la eduka sistemo, ĉar tiaj lingvoj entenas la kompleksecon de siaj respektivaj medioj, kaj ankaŭ por konsidero de la potencialo de neŭtrala internacia lingvo kombinanta klarecon kaj facilecon de lernado kun sia neŭtraleco, kaj tiel povanta esti rigardata kiel esence daŭripova.

S-ro Sklavig, la estro, venas en la oficejon. Li vidas ke Kruko laboras ĉe sia skribotablo.

Sklavig: Kruko, estas jam la dekkvina horo, kaj vi ankoraŭ laboras pri tiu raporto!

Kruko: Jes, ĉef'!

Sklavig: Sed vi promesis ke vi finos antaŭ la tagmanĝo!

Kruko: Mi ankoraŭ ne manĝis, ĉef'!

<esperanto-anekdotoj>

Laŭ iniciato de UEA eniris la dokumenton ankaŭ alineo, en kiu la konferenco rekonas, ke biodiverseco kaj lingva diverseco estas nedisigeblaj, konektitaj kaj interdependaj, kaj alarmas pri la perdo de tradiciaj scioj kiel sekvo de la perdo de lingva diverseco. La fina teksto ankaŭ alvokas la ŝtatojn antaŭenigi adekvatan lingvan politikon kiu atentas la bezonojn de la nuna kaj estontaj generacioj. Mencioj pri la graveco de lingva politiko por daŭripova evoluo kaj pri la valoro de kultura, lingva kaj etna diverseco estis aldonitaj plurloke. Interalie, la konferenco kuraĝigas evoluigi indikilojn ankaŭ pri lingva kaj kultura diverseco por mezuri la progreson al verda ekonomio.

Kvankam la deklaro de la NRO-konferenco en si mem ne reprezentas sintenon de UN, ĝi aperos en la dokumentaro de UN kaj havas valoron kiel morala premo de la civila socio al la monda organizaĵo. La partoprenintaj NRO-j direktis ĝin tute aparte al la konferenco "Rio + 20", en kiu ĉeestos ankaŭ UEA laŭ ĵusa decido de la Estraro. UEA partoprenos ankaŭ en la venontjara UN-konferenco de NRO-j, pri kiu en Bonn oni esprimis la deziron, ke ĝi okazu en Mez-Oriento, Nord-Afriko aŭ araba lando.

Kiel rezulto de la partopreno de UEA en la konferenco restos ankaŭ, ke la ĉeestintoj aŭdis pri lingvaj rajtoj, pri Esperanto kaj pri UEA. Sekve ili eksciis pri la defendado de lingvaj minoritatoj fare de esperantistoj kaj pri la uzo de Esperanto por interetna kompreniĝo, dialogo kaj komunikado.

Dokumentoj, videoj kaj fotoj pri la konferenco: <http://www.linguistic-rights.org/eventoj>.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

NOVAJ REU-MEMBROJ POR 2011

DUMVIVA MEMBRO

Sosov Jevgenij (Kazanj)

INDIVIDUAJ MEMBROJ

Surnakin Anatolij (Moskvo), Ŝevĉenko Aleksandr (Moskvo)

MECENATO

Gerŝman Anton (Moskvo)

FAMILIA MEMBRO

Ŝevĉenko Jelena (Moskvo)

Anatolij Ivasenko donacis al la ĝenerala kaso de REU 700 rublojn. Koran dankon al Anatolo pro subteno de la Unio!

ALIĜINTAJ KOLEKTIVOJ

Esperanto-klubo "EK-MASI" (Moskvo) (+ 1 membro): *Sidorova Valentina*

JEAĈR (Ĉeboksari) (13 membroj): *Alos i Font Hector, Belkin Jevgenij, Blinov Aleksandr, Grigorjevskaja Natalja, Grigorjevskij Andrej, Ivanova Marina, Kapitonov Danil, Konstantinov Anton, Moisejeva Aleksandra, Predaĉenko Jekaterina, Proĥorova Aleksandra, Ripani Massimo, Romanova Irina*

Plena aktuala listo de la membroj troveblas en la ttt-ejo de REU laŭ la adreso <http://reu.ru/membrolisto/>.

Baldaŭ komenciĝos la 27-a Rusia Esperantista Kongreso en Ceboksari. Samtempe kaj samloke okazos fama Lingva Festivalo – jam la 16-a fojon. Ne preterlasu okazon (re)vidi multajn esperantistojn kaj pasigi kelkajn tagojn en bonega etoso. Ĝis la revido en la ĉuvaŝia ĉefurbo!

KOTIZOJ DE REU/REJM POR 2012

Membri en REU oni rajtas ekde la aĝo 18 jaroj; 14-17-jaruloj rajtas aliĝi kiel kandidatoj.

Individua kotizo – 200 rub. (por ekster-KSŜ-anoj – 20 eŭroj) ĝis la 29-a de februaro 2012, 250 rub. (por ekster-KSŜ-anoj – 25 eŭroj) ekde la 01-a de marto 2012; inkluzivas la membrokarton, Jarlibron/Manlibron de REU, Bultenon de REU en elektronika formo (laŭpete – en la papera) kaj aliajn informojn de REU, voĉdonrajton en Konferenco de REU, rabatojn en E-aranĝoj de REU.

Mecenata kotizo – 500 rub.; inkluzivas ĉion la saman kiel por la individua kotizo, krom unu escepto: sur la membrokarto estos skribita "Mecenato de REU".

Dumviva kotizo – 5000 rub. (por ekster-KSŜ-anoj – 500 eŭroj); inkluzivas ĉion la saman kiel por la individua kotizo dum la tuta vivo.

Familia kotizo – 100 rub.; inkluzivas la membrokarton, voĉdonrajton en Konferenco de REU, rabatojn en E-aranĝoj de REU. La familiajn kotizojn rajtas pagi samadresaj parencoj de individuaj, dumvivaj aŭ mecenataj membroj.

Kolektiva membrokotizo – 70 rub. por ĉiu aligita membro (la aliĝintaj kolektivoj pagas minimume por 5 aligitaj membroj); inkluzivas po 1 ekzemplero de REGo kaj Jarlibro/Manlibro de REU por kluboj kun 5-15 aligitaj membroj kaj por ĉiu aldona deko de la aligitaj membroj, aliajn informojn de REU por la kolektivo; la membrokartojn, voĉdonrajtojn en Konferenco de REU, rabatojn en E-aranĝoj de REU por la aligitaj membroj.

Aliĝkotizo – 300 rub., unufoje pagata de nova aliĝinta kolektivo. La jamaj aliĝintaj kolektivoj ne pagas ĝin. La nova kolektivo iĝas regiona organizaĵo de REU kaj laŭpete ricevas dokumenton pri tio. Se la kolektivo ne pagas kotizojn por aligitaj membroj dum du sinsekvaj jaroj, ĝi estas konsiderata likvidiĝinta kaj poste devus denove aliĝi al REU.

Amiko de REU – senpage; inkluzivas partoprenrajton (sen voĉdonrajto) en Konferenco de REU, Bultenon de REU en elektronika formo kaj aliajn informojn. Oni rajtas aliĝi kiel "Amiko de REU" nur unufoje. Persono, sin anoncanta "Amiko de REU", devas plenigi aliĝilon kaj mencii sian retadreson.

Rabatita abono de REGo – 450 rub. (ekster Rusio – 20 eŭroj), por ĉiuj membroj. La dumvivaj membroj, kiuj pagis sian kotizon en 2001-2003, plu ricevados REGon sen aldona pago.

Ĉiuj membroj de REU kun la aĝo malpli ol 31 jaroj aŭtomate iĝas membroj de la junulara sekcio REJM (Rusia Esperantista Junulara Movado) kaj ricevas voĉdonrajtojn en REJM-voĉdonoj.

Membroj de REU iĝas aligitaj membroj de Universala Esperanto-Asocio, la malpli ol 31-jaraj – ankaŭ de TEJO.

Aliĝilojn, rublajn kotizojn kaj rabatitajn abonpagojn por REGo sendu (poŝtmandate) al: ***142717, Московская область, Ленинский район, п/о Развилка, до востребования, Наталье Николаевне Шороховой***; eblas ankaŭ pagi per la sistemo **Yandex-denjgi**, numero de la "monujo" estas ***41001612527392***. La eŭraj kotizoj pagendas al la konto **reua-p** ĉe UEA.

Eksciu, ke...

ĜEMELURBA RENKONTIĜO

Oficiala ĝemeliĝo de la urbetoj Tiĥvin (Rusio) kaj Herouville Saint Clair (Francio-Normandio) okazis antaŭ 20 jaroj, sed la esperantistaj komunumoj establis kontaktojn eĉ pli frue, en 1990. Tamen la unua amika vizito okazis ĝuste en novembro 1991: la tiĥvinanoj venis al siaj francaj amikoj. Post unu jaro sekvis reciproka vizito – dekdu normandianoj gastis en Tiĥvin. Tiel ekis regula esperantista interurba kunlaboro – same vigla, se ne eĉ pli aktiva ol kunlaboro de la ĝemelurbaj sportistoj, muzikistoj, instruistoj – la kunlaboro praktike utila por ambaŭ urboj, do la kunlaboro, dank' al kiu, grandparte, Tiĥvina E-klubo (TiEK) posedas kaj subtenas sian aŭtoritaton, estimatan de ĉiuj urbaj instancoj.

Se oni rakontu nur pri la vojaĝoj – ĉiu el tiuj multnombraj estas zorgeme preparata de ambaŭ flankoj. Ankaŭ la vican, kvinan viziton de la francoj ni estis preparantaj preskaŭ dum unu jaro. Dum la preparado estis pridiskutita kaj finpolurita programo de la vizito, preparitaj ĉiuj necesaj dokumentoj, sukcese superitaj ĉiuj nepraj formalaĵoj... Fine, la 3-an de septembro, en la flughaveno Pulkovo ni renkontis la seppersonan gastaron, gvidatan de la brava prezidanto de la Normandia E-societo, s-ro Gerard Senecal. Du el la alvenintoj vizitis nin jam la trian fojon, unu – la duan, ceteraj kvar venis al ni unuafoje.

Restado de la ĝemelurbaj gastoj en Tiĥvin daŭris kvar tagojn, kaj la tagoj estis tiom eventoplenaj, ke la francoj, loĝigitaj en esperantistaj familioj, venadis al siaj provizoraj hejmoj nur por tuja enlitiĝo kaj ekdormo. Okazis renkontiĝo kun la anoj

de rusa-franca societo de amikeco, vizitado de la urbaj vidindaĵoj kaj busa ekskurso al du antikvaj monaĥejoj, intervjuoj por la urbaj amaskomunikiloj kaj amasa elurbiĝo por kantado-ŝaŝlikumado. La programon kronis la lasta amika vespero, okazinta en la artlernejo nome de Rimskij-Korsakov. Unua parto de la vespero estis ĉarma koncerto. La salonon plenigis ne nur la francaj gastoj kaj lokaj esperantistoj, sed ankaŭ reprezentantoj de la urbodomo kaj urbaj amaskomunililoj, invititaj geamikoj... Ne mankis kantado ankaŭ dum la dua parto, kiu pasis ĉe la servita tablo en alia salono de la sama artlernejo – ĉi-foje sonis ĉefe komunaj kantoj – la francaj kaj ankaŭ niaj Oraj, kiujn la gastoj fervore subtenis, konsultante la tekstolibretojn... La sekvan matenon buseto forveturigis la gastojn al Sankt-Peterburg.

Endas diri, ke, por akcepto de la franca esperantista grupo, TiEK ricevis gravan materialan subtenon. Nin helpis la urbestraro, provizinte per buseto por preni la gastojn en Pulkovo kaj por revenigi ilin al Peterburgo. Kelkaj urbaj firmaoj sponsoris nin finance – tio ebligis senpagan restadon de la gastoj en Tiĥvin sen damaĝi la buĝeton de lokaj esperantistoj.

Sed la programo de niaj gastoj ne estis elĉerpita. Dum la sekvantaj kvar tagoj ili restadis en Sankt-Peterburg, ĝuante belaĵojn de la urbego. Poste, sub lerta gvido de Svetlana Smetanina (apartan dankon al ŝi de TiEK!) la francoj vizitis la urbojn Ivanovo, Pljos, Paleĥ, Suzdalj, fininte per kelktaga restado en Moskvo. Kun abunda provizo da impresoj kaj suveniroj ili flugis hejmen nur la 21-an de septembro.

Ĉu oni finu per informo, ke la reciproka vizitado daŭras plu? Do jes, ĝuste nun, finseptembre, unu el la gastigantoj, esperantistino Gadela Osipova, ene de la delegitaro de la tiĥvina amikec-societo, estas en Herouville Saint Clair.

Mikaelo Bronŝtejn
(Tiĥvin)

Mikaelo Bronŝtejn (Tiĥvin)

Inter junaj koroj

raportetoj pri IJK-67[1]

6.

Ekster junulara vervo
lokas sin la libroservo.
Triste en solec' intima
povra Cibulevskij Dima
de mateno ĝis vespero
ĉiutage kun espero
pri alven' de aĉetantoj
sidas tie. Tamen vantaj,
ekskursantaj aŭ kantantaj,
dancetantaj, diboĉantaj,
plu ignoras aĉetantoj
(pli precize – aĉetuntoj)
tablojn kun ne tro abundaj,
sed sufiĉaj por kontento
trezorejoj de l' prudento.
Nova PIV sopiras linda
apud Kolker kompatinda.
Kun mamute muta voko
gvatas mia librostoko,
kaj du Melnikov en fin' –
Aleksandr kaj Valentin.
L' kovrilpaĝojn kovras polvo...
Ĉu ekzistas ia solvo
por al la libraro ligi
l' junularon? Por legigi?
Mi ne scias...

[1] Daŭrigo, la komencon vidu en REGo, № 4 (65), aŭgusto 2011, p. 4

7.
Mi salutas vin, brila Kievo,
Olda princ' kun animo infana!
Ni promenas. Varmego kaj revo
estas nia etos' akompana.
Ni promenas. La esperantistoj
amasiĝas por gaja marĉando
apud la suveniroj turistaj.
L' serpentuma pavima rubando
gvidas suben kun stumblo kaj ŝvit'
al alia rubando, la Dnepra,
al la savo, al ĝua eksid',
al trinkado enombra, la nepra,
al trankvila gapado ĉirkaŭen.
Per cent mil rutinaĵoj taŭzata,
hejmen hastas Kievo jam, aŭ en
manĝejegon kun nomo "Puzata
Ĥata", kio signifas "Kaban'
kun ventrego" – la nom' simpatia.
Vizitindas. Sed gvidas elan'
al belaĵoj – ĉi tia, kaj tia…
Ni promenas. Per milda seren'
nin Kievo vespera dorlotas,
kvazaŭ guston de tiu promen'
enanimen por ĉiam enfotas.

8.
Ĉu nun mi raportu pri la junulinoj?
Ho jes! Ili ĉarmas.
Kaj, spite la aĝon, l' viraĉaj inklinoj
en mi ekalarmas.
Ja tiom da lumo al mi elradias
l' okuloj senĝenaj!
Ja la ruzulinoj perfekte konscias,
ke l' movoj promenaj
de ĉiuj ĉi pufaj kaj molaj trezoroj,
gapataj avide,
enorman eksciton en cerboj kaj koroj
flamigas. Kaj mi de
l' vertiĝo min savas per tuja eksido

kaj flankenrigardo,
kredante, ke ĉiu havigas al si do
porcion da ardo,
fuĝante de memkompreneblaj difinoj,
tro klaraj por mi, kaj
veante: – Ho, ili ja estas filinoj
de miaj amikoj!

9. *Kanto por IJK*
Saluton, la gent' nekonata,
kun svaga scivol' alveninta
al mia vojeto malglata,
al mia destino absinta.
Ĉe mia fidela gitaro,
senbride kantema inklin',
mi kantu hodiaŭ al vi, junularo,
kun kred', ke vi aŭdas min.



Entute sen celo edifa,
nur por amikiĝo sincera,
mi venis kun koro soifa
al la alparolo senpera,
por tuŝi la kordojn misterajn
ne nur de l' fidela gitar',
sed ankaŭ kaŝitajn, ensinajn, internajn
en via anim', junular'.

Kredeble, sukcesos kompreni
ni unu alian sen peno.
Rigardoj atestos ja, ke ni
similas en nia sinteno
rilate al am' kaj molesto,
kruelo, kompato, naiv'.
La horon por la kantoplena kunesto
donacas hodiaŭ la viv'.

Saluton, la gent' nekonata!..

10.
Mi konstatu kun cert',

ke dum mia koncert’
ensalone ne estis dormantoj.
La surplanka publik’
kun aplaŭd’, sen implik’
perceptadis la vortojn de l’ kantoj.

Mi konfesu, ke min
la enigma fascin’
kaptis tuj, kvazaŭ viv-aksiomo:
kiel juna stalon’
kun la tuta salon’
dancis mi dum koncerto de JoMo.

Mi aludu, ke por
ven’ de pac’ al la kor’
la muzik’ devas esti mistero.
Lulis min en bonfart’
la koncert’ de Ĵomart’
kaj Nataŝa dum paca vespero.

Mi observis kun mir’,
ke l’ publik’ en delir’
kantis kune kun Martin en aŭlo,
kaj akceptis kun laŭd’,
per senlaca aplaŭd’
la kortuŝan kantadon de Paŭlo.

Furiozis publik’
ĉe Johannes, Pafklik’,
Ukraina teamo, Sergeo,
Lena, Paŭloj – jam du!..
Kuris temp’ sen enu’
Ĝis la fina koncert’ – apogeo.

Iu diros, ke tro.
Iu diros, ke pro
la koncertoj maldormon li spertis.
Sed ja estis etos’,
kaj inspir’ kaj ripoz’!
Sekve, ni ne malbone koncertis.

11.
La sun' inkandeska surstrate
ŝvitigas nin tro senkompate,
des pli dum la busa vojaĝo –
al la hospital', ne al plaĝo.
Sed ŝvitas fervore mi, ĉar
dum horo mi kun amikar'
aspiras al nia fidela
malsana amik' Mikaelo.
Anstataŭ gvidado IJK-e
Li estas – ho, ve! – aliloke,
en la dekunua etaĝo
de la hospital'. Sen kuraĝo
la nazon enĉambren mi ŝovas,
rigardas ĉirkaŭen kaj trovas,
ke brave – mi diru honeste –
aspektas amiko Lineckij.
Jes, pala, sed plu ambicia,
agema kaj plenemocia,
perdinta neniom da ventro,
kun vervo, racio, prudento
ektraktas IJK-ajn problemojn...
Ni tamen evitas la temojn
kun ajna danĝer' por la koro.
Ne pensu li nun pri l' laboro,
ne prenu l' problemojn enkapen,
saniĝu sen strebo eskapen
kaj multajn jardekojn pluvivu –
Amegu! Agadu! Aktivu!

12.
Eŭgeĉjo, amik' kun grumblemo,
verŝajne, denaska,
kun barb', bonkorec', babilemo,
en tag' antaŭlasta
IJK-on subite alvenis
kaj trovis kun miro,
ke lin junularo atentis
nur per preteriro.

Nur mi, la oldulo, brakumis
Eŭgeĉjon amike.
Li ĝojis, sed tuj ekgrumblumis:
– Supozis ja mi, ke
la famo pri mia agado
ankoraŭ radias!
Sed la junulara movado
nenion eĉ scias,
pri ni, veteranoj, portintaj
la lingvon en tuto
por ili, ludintaj-dancintaj...
Kaj nun – sen saluto
Renkontas nin la posteuloj...

Mi diris: – Eŭgeĉjo,
Fajfetu pri viaj postuloj.
Plej gravas, ke l' meĉo
post flugo kun temp'-papilio
nun estas en manoj
de l' nova generacio –
tre ĉarmaj infanoj.
Do certe, la lingvo penetre
pluvivos en mondo.
Ridetu al ili. Kaj nepre
vin trafos respondo.

NOVA ELDONO DE LA FUNDAMENTO

Ĉe la eldonejo Impeto aperis nova libro: **L.L. Zamenhof.** ***Fundamento de la internacia lingvo Esperanto.*** Represo de la 2-a eldono de "Posrednik", 1911 (Al centjariĝo de la 2-a eldono en la eldonejo "Posrednik").

Pliajn informojn eblas ricevi en la retejo de eldonejo:
<http://www.impeto.trovu.com/zam3>.

Loĝantoj de Rusio jam povas mendi la libron perpoŝte:
<http://lernolibro.ru/zamenhof2011>.

<reu-agado>

“Velura sezono-16”

La 22-an – 30-an de julio en Jalto okazis arta E-festivalo “Velura sezono-16”. Krom 18 jaltanoj ĝin partoprenis 33 esperantistoj el 13 landoj, kiuj venis karavane post IJK-67; el Rusio estis 5 personoj.

La karavano estus pli multenombra, se ne konstante aperanta en anonctabulo de la kongreso misinformado pri neceso alsendi monon ĝis la 15-a de majo por aĉeti biletojn el Kievo al Krimeo (dum en retejo de la festivalo la limdato estis junio). Alia malbonaĵo estis, ke nur en la tria informilo de la kongreso aperis nomoj de kantistoj kaj kantgrupoj, partoprenontaj la koncertojn. Tial organizantoj de la postkongreso ne povis anticipe inviti ilin al la festivalo... Dum la postkongreso la kongresintoj interŝanĝis impresojn pri la kongreso. Plejmulto esprimis opinion, ke ĝi estis organizita malorde, sed tutegale estis mojosa kaj bonetosa.

La programo de la postkongresa festivalo estis riĉa kaj bone organizita: koncertoj, ekskursoj, turistaj marŝoj.

Solena malfermo kaj koncerto de Pavel Moĵajev okazis en la urba biblioteko, kies fondinto kaj unua direktoro estis fama Esperanto-pioniro Nikolaj Borovko.

Okazis prezento de la spektakloj “Masko”, “Longa lango” kaj “Dramo” de la jalta E-teatro “Improvizo”. Revenis tradicio de la unuaj festivaloj “Velura sezono”: la fondinto kaj la direktoro de la fama livadia orgena halo okazigis por la festivalanoj koncerton.

La partoprenantoj kaj organizantoj restis tre kontentaj. En urbaj kaj respublikaj retejoj aperis pozitivaj informoj pri la postkongreso.

Jefim Zajdman (Ukrainio)

Filmoj de la Esperanta Kinofestivalo





"The Universal Language" – "La universala lingvo"

"Ĉapeloj"

"Conlang"